

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Kampanjo 2000:
Ĉu UEA malhavas
strategion?**



**Honkongo:
La Reveno kaj
la esperantistoj**



**Fenomena
psikologo lernis
Esperanton**



REF: Plua ŝtupo por denaskuloj

Enhavo

- 161 Historio: La Mozarto de psikologio studis Esperanton
- 162 Kampanjo 2000: Disvastigo, utiligo, edukado (Gian Carlo Fighiera)
- 164 Honoraj oficoj: Honora Membraro atingis 60
- 165 Eksteraj rilatoj: UEA en nova lingva konsilio (Hans Erasmus)
- 166 Literaturo: Pri blokado kaj tabuoj (István Ertl)
- 167 Belartaj Konkursoj: Pli da premioj preferataj; Rezultoj de Belartaj Konkursoj de UEA 1997
- 168 Kotiztabelo de UEA por 1998
Literaturo: Kvodlibeto
- 169 Someraj renkontiĝoj: Kiu spertis, revenas (Guido Van Damme, Stefan MacGill); Tri aranĝoj en familia etoso (Augusto Casquero); Lingva egalrajto (Interredaktore)
- 170 Filmo: Esperantaj dialogoj
Fakaj asocioj: Integriĝo aŭ izoliteco? (Nora Moerbeek)
- 171 Instruado: Pasporto al la reala mondo (intervjuo kun Paul Gubbins); Krizantemo vigligis serban kurson (Radojica Petrović)
- 172 Azio: Honkongo: Variaj gradoj de eŭforio (intervjuo kun Werner Breitung); La Reveno kaj ni (Bill Mak)
- 173 Interlingvistiko: Katedro en Amsterdamo; CDELI tridekjara Forumo: Absoluta nigro maljustas (Detlev Blanke)
- 174 Recenzoj: *El miaj sonoraj soloj. Poemoj 1992-1995* (Aldo de'Giorgi); *Kolera afero, Sep krimnoveloj, Morto de sciencisto, Refoje krimnoveloj sep, Tria kolekto da krimnoveloj* (Bruce Crisp)
- 175 Laste aperis
- 176 Foliume
- 177 Intervjuo: La sepjara verkenigmo (intervjuo kun Ron Gates)
Persone – Loke – Fake
- 179 Oficiala Informilo
- 180 Nekrologoj: Roger Bernard (1907-1997) (Reinhard Haupenthal)

Vi trovos

kvazaŭ inviton al kinejo sur p. 170: la Holivuda — do certe tutmonde spektota — filmo *Gattaca* sonos, laŭ niaj lastaj informoj, parte en Esperanto. Tamen, pli ol reklami ĉi tiun elkovaĵon, ni preferas tutkore rekomendi al vi alian produkton kalifornian: *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* estas, laŭ sia scenaristo Paul Gubbins, “la plej ambicia dramprojekto iam ajn entreprenita en Esperantujo” (p. 171). Ne hezitu do subteni ĝin — kiel faris, cetere, la Estraro de UEA kaj Fondaĵo Saliko.

“Trove la eblajn elirojn el la sakvojo en kiu Esperanto ŝajne troviĝas” — laŭ Gian Carlo Fighiera tio kaj nenio malpli estas la tasko kiun devas surŝultrigi al si la proponantoj de Kampanjo 2000 (p. 162). Li mem kontribuas al tio per fasko da ideoj kaj, precipe, per emocia alvoko por “etosoj de unueco, en kiu ideoj kunpuŝiĝoj ne eliru el la kadro de simpla diskutado.”

La kovrilo: Renkontiĝo de Esperantaj Familioj estas aranĝo kun granda tradicio, sed malsufiĉa famo (p. 169). Kaj, tamen, ĝi estas la loko kie denaske E-parolantaj infanoj povas sperti tiun stimulan etoson de komuneco kiun plejparte donas nur la lingvo de la medio. (Foto: Guido Van Damme)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktifino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-652-4488 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

La Mozarto de psikologio studis Esperanton

“En tiuj jaroj [1910-13] li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj memstare lernis la lingvon” — skribis Gita L. Vigotskaja pri sia patro, la mondfama psikologo Lev Vigotskij (ofta transliterumo: Vygotsky), en faka artikolo. Nia enketo konkludas ke estus ja troige nomi Vigotskij esperantisto, sed plian fojon konfirmiĝas ke Esperanto ĉiam allogis la scieman generacion adoleskan.

Antaŭ kelkaj monatoj Edmond Plutniak, lerneja psikologo kaj UEA-delegito en Arras (Francio), atentigis nin pri la ĵus citita frazo, trovebla en revuo pri lerneja psikologio, *School Psychology International*, kiu en speciala numero (majo 1995) pritraktis la influon de Vigotskij al tiu branĉo de aplikata scienco. Enkonduke la revuo aperigis biografian skizon de Gita Lvovna Vigotskaja pri sia patro. Ŝi skribis interalie pri la adoleskeco de Vigotskij: “Lev kreskis kiel societema knabo. Liaj samaĝuloj logiĝis al li, kaj amikoj ofte ĉirkaŭis lin. Kiel li, ili ĉiuj interesiĝis pri kolektado de poŝtmarkoj, ŝakludo kaj — laŭ propra konfeso — legado de aventurromanoj. (...) En tiuj jaroj li ekinteresiĝis pri Esperanto kaj memstare lernis la lingvon.”

Ni turnis nin al la tradukinto de la (origine ruslingva) teksto, Ilya Gindis, kiu komunikis jenan respondon de sia patro Boris Gindis, specialisto pri Vigotskij: “Vigotskij ekinteresiĝis pri Esperanto pro sia frato [laŭ Gita Vigotskaja: kuzo — *Red.*] David, kaj ŝajne lernis la lingvon iam inter 1910

kaj 1913. Malfacilus difini kiom multe li ĝin konis, sed estas racie supozi ke li atingis bonan nivelon, ĉar ĉiun taskon kiun li alprenis, li plenumis kun grandaj inteligento, emo kaj rezoluteco.” Laŭ Boris Gindis ne estas certe ĉu Vigotskij iel partoprenis la Esperanto-movadon. “Tiutempe li vaste interesiĝis ne nur pri psikologio, sed ankaŭ pri medicino, literaturo, filozofio kaj arto. Esperanto eble estis unu plia intereskampoj kiel tiuj; ne klaras kiugrade Vigotskij ĝin kultivis.”

Ni petis de Irina Aleksejeva, junulara delegito en Elektrostal’ (apud Moskvo) kaj ofta kunlaborantino de *Kontakto*, kontakti por ni la filinon de Vigotskij. Gita Vigotskaja donis al ŝi jenan intervjuon:

En via artikolo vi menciis ke via patro estis esperantisto. Kial vi skribis pri tiu ĉi fakto?

Mi nur ŝatis montri ke tiu juna homo havis ege vastajn interesojn, riĉajn sciojn, ke li estis vere celkonscia.

Kiel Lev Semjonoviĉ eksciis pri Esperanto?

Li havis kuzon, David Isaakoviĉ Vigodskij, iom pli aĝan ol li. Poste David iĝis rimarkinda lingvisto kaj filologo. Dum la infaneco kaj junaĝo li influis la personecon de Lev. David estis esperantisto. Laŭ mia scio, li eĉ estis delegito de la urbo Gomelj. [Ni ne sukcesis trovi spuron pri tio. — *Red.*] David donis al Lev ekzemplon lerni Esperanton.

Ĉu via patro studis la lingvon serioze?

Verŝajne jes, pro la fakto ke dum la junaĝo li vaste uzis la lingvon por korespondi pri diversaj demandoj kaj ankaŭ por interŝanĝo de poŝtmarkoj. Pri tiu ĉi korespondo rememoris amiko el lia junaĝo, S. F. Dobkin. Li menciis en artikolo ke mia patro korespondis kun junulo el Islando.

Ĉu aliaj el via familio, krom Lev kaj David, studis Esperanton?

Mi ne certe scias. Ĉiuj infanoj en la familio Vigotskij estis kleraj kaj scipovis kelkajn lingvojn. Ekzemple, mia patro parolis ĉiujn eŭropajn lingvojn, kaj krome li konis la helenan, hebrean kaj latinan lingvojn. ★

Lev S. Vigotskij (1896-1934)

Nomata “Mozarto de la psikologio” pro sia mallonga sed brile produktiva vivo, Vigotskij restas rimarkinda pro siaj esploroj kaj teorioj pri la evoluo kaj strukturo de la homa konscio. Plej konata verŝajne estas lia teorio de signoj, klariganta kiel infanoj internigas lingvon dum sia kultura evoluo. Lian karieron abrupte tranĉis frua morto pro tuberkulozo, kaj lia vivoverko longe restis apenaŭ konata — en Sovetio pro la stalinisma sciencpolitiko, okcidente pro la superrego de behaviorismaj skoloj. Agnosko venis nur post la anglalingva publikigo de liaj *Penso kaj lingvo* (1962), *Menso en socio* kaj *La psikologio de arto* (ambaŭ 1978).

Menciindas ke en la 20-aj jaroj agadis ankaŭ psikologoj efektive esperantistaj: En 1925 Pierre Bovet (1878-1965) en Ĝenevo publikigis la libron *Psikanalizo kaj edukado*. Samjare aperis anglalingva studo de John Carl Flugel (1884-195?) pri “Kelkaj nekonsciaj faktoroj en la movado por internacia lingvo, kun speciala referenco al Esperanto” en *International Journal of Psychoanalysis*. En 1926 sekvis la libro *La arto de memdisciplino* de Charles Baudouin (1893-1963).



Disvastigo, utiligo, edu

Laŭ Gian Carlo Fighiera, e-isto de 50 jaroj kaj iama Konstanta Kongresa Sekretario, estrarano kaj komitatano de UEA, "Esperanto ŝajne troviĝas en sakvojo". Li tamen vidas kaj proponas eliron — kondiĉe ke Kampanjo 2000 "tradukiĝos en taktikajn subplanojn" kunlabore realigotajn.

La du artikoloj de la prezidinto de UEA, Humphrey Tonkin, pri la strategio de la Asocio (jan., p. 2 kaj feb., p. 22) signifas eble la plej kompletan kaj lucidan radioskopion pri la lingvo kaj movado kiun mi iam ajn legis. Aldone al tiu centra analizo — kies tezoj konverĝas al la miaj — aperis ankaŭ sektoraj kontribuoj (Blanke, Corsetti, Fettes, Golden, Tišljär, Wandel, Čolić kaj aliaj), kiuj, kune kun kritikaj artikoloj en *Heroldo*, sinergie helpas trovi la eblajn elirojn el la sakvojo en kiu Esperanto ŝajne troviĝas.

Metode, sciencece kaj senpasie, la supraj eseoj de Tonkin, bazitaj sur lia Strategia Plano de 1988, vivisekcias la fortojn, malfortojn, ekspluateblajn okazojn, minacojn kaj prioritatojn kiuj koncernas Esperanton. Temas ĉi tie ne pri la lingvo Esperanto, ĉar lingvo en si mem estas konvencia komunikilo kaj en tia funkcio ne havas strategion nek ideologion (Blanke, apr., p. 77). Kontraŭe, lia diskurso rilatas nur al la ideo kaj celoj de la poresperanta movado, kiu formiĝis inspirite de kaj subtene al la internacia lingvo.


Ni tuj anticipu ke Tonkin identigas tri movadajn prioritatojn: a) disvastigo de la lingvo, b) ĝia utiligo, c) edukado per ĝi al tutmonda konscio.

La dirotaj konkludoj baziĝas sur analizo de la historio de la movado en la pasintaj 110 jaroj.

"Ĝis la bela sonĝo de l' homaro..."

Inter 1921 (Ligo de Nacioj) kaj 1993 (Unesko) la E-movado plurfoje per rektaj proponoj kaj amaspeticioj provis konvinki interregistarajn organizojn rekomendi la oficialigon de la internacia lingvo. La du lastaj alpaŝoj (1966 ĉe UN kaj 1993 ĉe Unesko) malsukcesis: la unua malvenko ŝuldiĝas, laŭ mi, i.a. al surpriza procedura eraro de UEA, la dua al naiva surloka agado de Esperanto-Radikala Asocio (ERA). Kelkaj mondskalaj penadoj samdirektaj okazas ankoraŭ nun per prudentaj kaj laŭstupaj paŝoj, ekz. ĉe Ekosoko (Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN) fare de la prezidanto de UEA, kiu apogas sin sur la Transnacia Radikala Partio, varbita de ERA por Esperanto. Krome, aliaj regionaj aŭ tutmondaj iniciatoj de E-premgrupoj disvolviĝas paralele (Frank: propedeŭtika propono; Erasmus: eŭropa laborgrupo; Pirlot: parlamenta agado; Silfer: Esperanta PEN-Centro ktp).

Pro la ĝisnunaj malsukcesoj, multaj esperantistoj hodiaŭ opinias ke la agado ĉe la interŝtataj organizoj ne kondukas al la fina celo, kiun Zamenhof mem tiel poeziece



Neniu atendis antaŭ deko da jaroj ke la Berlina muro falos en 1989; simile, neniu scias kiel evoluos la sinteno de estontaj generacioj rilate la proponon Esperanto — argumentas la aŭtoro.

proponas en "La espero". Aliflanke, la priskribita klopodado ne estis tute senrezulta: la du rezolucioj de Unesko (1954, 1985) kaj la Deklaracio de Manilo (Monda Turisma Organizo, 1980), inter aliaj atingoj, sendube signas moralan rekonon de la lingvo, kio ja esence gravegas por mutigi la ĉefan antaŭjuĝon rifuzantan al Esperanto eĉ filologian seriozecon kaj, sekve, ekzistaraĵton en la familio de la lingvoj. Post 1965 UEA ne plu ellaboris mondskalan strategion (dumaj laborplanoj havis nur taktikan dimension), pro kio la Asocio ĝis antaŭ nelonge ricevis multajn riproĉojn. Kiel ni poste vidos, nuntempe la Asocio revigligis per Kampanjo 2000, kiu ne plu promesas la finan venkon — kvankam ĝi estis ekde Zamenhof la konektiva histo de la poresperanta agado —, sed proponas pli limigitajn etapojn. Temas pri la politiko de mallongaj paŝoj, siatempe indikita de Werner Bormann.

Movado kaj socio

Kontraste al la finvenkisma tradicio kaj reage al supozita manko de perspektivoj, en 1980 naskiĝis kritika pensofluo, konata kiel "raŭmismo" (pro sia manifesto lanĉita dum TEJO-kongreso en Rauma, Finnlando). Tonkin neŭtrale priskribas ĝin, sed evitas citi ĝian nomon. Tiom da prudo surprizus nin, se ni ne scius ke la manifesto de Raŭmo longe eĉ ne estis menciita en la organo de UEA: dum 11 jaroj la vorto *raŭmismo* tabuis.

Kion proponas Raŭmo? La disvastigo de Esperanto, ĝi diras, ne celu la neatingeblan finan venkon, sed la praktikan utiligon de la lingvo kiel identigilo de diaspora lingva minoritato, kiel ilo de supernacia kulturo bazita sur la valoroj de reciproka respekto, toleremo kaj solidaro.



Pli malfrue, en Segedo (Hungario), raŭmismon integrigis kritiko kontraŭ la burokratea vertikala organizo (UEA) kaj pledo por horizontala kunlaboro de reto da organizaĵoj (Grésillon, KCE k.s.). Laŭ tiu ĉi pensado, la esperantistaro formas socion, komunumon, ne movadon direktitan al utopia celo.

Kion opinias la esperantistoj? Eĉ se nuntempe ili ne klare perceptas la vojojn de la oficialigo de Esperanto, ilia granda plejmulto konsideras ke, tamen, la dirita oficialigo devas esti plu proponata al la mondo. Laŭ mi, neniuj kapablas profeti la evoluon de la historio, eĉ ne en mezlonga tempo: ni mem spektis subitajn tutplanedajn politikajn mutaciojn en la laste forkurintaj dek jaroj, pri kiaj neniuj eĉ revis kelkajn jarojn pli frue. Hodiaŭ Esperanto estas rigardata de la publika opinio kun indiferento, kvankam multe pli serioze ol en pasintaj tempoj, sed neniuj scias kiel evoluos aŭ mutacios la sinteno de estontaj generacioj rilate nian proponon.

La nombro de senkompromisaj raŭmistoj estas kalkulebla per malmultaj fingroj: eĉ TEJO, la junulara sekcio de UEA, ne estas raŭmista en la strikta senco de la vorto; la plejmulto de la simpatiantoj kun tiu ĉi tendenco aktivis ankaŭ en la organizita vertikala movado, praktike aplikante la tezon de Tonkin ke “finvenkismo” kaj “raŭmismo” povas kunekzisti. La saman opinion mi prezentis al la 2-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso (Parizo, 1995)¹. El tio eliras la konvinko ke kaj la menciita silenta subfoso fare de UEA kaj la atakoj el la kontraŭa flanko estas neakcepteblaj. Tial ke internaj ideologiaj konfliktoj ĉiam malutilas, ni, parafrazante Newton, konkludu: “ho! pragmatismo, savu nin de finvenkismo kaj raŭmismo!”

La rolo de UEA

Unue, necesas respondi al la demando ĉu UEA reprezentas aŭ ne la tutan movadon. Kvankam al ĝi aliĝas aŭ kun ĝi kunlaboras preskaŭ ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj institucioj, ekster ĝi agas kelkaj aliaj sendependaj organizoj kiel Sennacieca Asocio Tutmonda, Kooperativo de Literatura Foiro ktp. Teorie, tio sufiĉas por samopinii kun Tonkin ke “la movado estas pli vasta ol UEA”; praktike, UEA estas la referencpunkto de eble 90% de la esperantistoj, UEA estas la sola forto kiu posedas la necesan karismon kaj la organizajn, homajn kaj potenciale la financajn rimedojn por tutmonde antaŭenigi la internacian lingvon. Sekve de tio, UEA apenaŭ troigas parolante en la nomo de la esperantistaro.

Ni transiru nun al la celoj de la Asocio. Tonkin atentigas ke eĉ la Statuto de UEA ne klare montriĝas finvenkisma, ĉar ĝi pli modeste preskribas agadon “por la solvo de la lingva problemoj”, kio — por la aŭtoro de la artikoloj — signifas “laŭgradan procedon, kiu ne baziĝas sur espero je subita kaj utopiista konvertiĝo de la homaro”. Aparte de tio, ni rimarku ke en la Statuto troveblas ankaŭ elementoj de raŭmismo (art. 3). Ĉio kune donas al UEA la aŭtoritaton por sinergie funkcii kiel komuna domo de ĉiuj amikoj de la lingvo kaj de la movado. Tiurilate, oni rajtas demandi sin ĉu la Asocio vere agas konforme al tiu ĉi rolo. Elirpunkto de la analizo estas la konstato ke UEA kaj liveras servojn al siaj membroj kaj antaŭenigas Esperanton en la mondo.

a) Servoj

Kelkaj servoj inkluzivigas en la kotizo (revuo, Jarlibro); aliajn la membraro pagas aparte (Libroservo, Universala Kongreso). La dua kategorio elvokas kelkajn rapidajn komentojn.

La Libroservo, krom doni al la Asocio atentindan profiton, formas tre vastan merkaton por la E-literaturo: per sia grandskala vendado, la servo esence subtenas la eldonadon de verkoj en la internacia lingvo. Rilate la UK-ojn, ni diru ke laŭ nombro de partoprenantoj kaj de programeroj (ĉirkaŭ 200) ili enviciĝas inter la plej imponaj internaciaj kongresoj en la mondo. Certe, la UK — tiu senkompara universala respubliko unulingva — bezonas renovigon (Ĉolić, majo, p. 91), tamen entute ĝi estas kontentige organizata kaj kutime liveras al UEA imponan enspezon. Tre imponan, ĉar la Asocio enkasigas el tiu ĉi fonto ankaŭ sumojn alimaniere necesajn por pli efika kongresa mastrumado kaj ekstera informado.

b) Ekstera agado

Tonkin distingas du kampojn: informado kaj instruado. Pri la unua, ni esperu ke finiĝis la epoko de “nekontento pro la manko de celoj kaj agad-direktoj” (Corsetti, majo, p. 83), kiam eĉ la gazetara servo de la Asocio haltis. Revekiĝo nun konkretiĝas en Kampanjo 2000, kiu premias elstarigas la defendon de la lingvaj rajtoj (egaleco de ĉiuj lingvoj) fare de la transetna lingvo Esperanto. Same kiel la Plano de 1988, la nuna Kampanjo en si mem konsistas el bazaj principoj kaj listo de ĝeneralaj celoj: ĝi bezonas tradukiĝi en taktikajn subplanojn aŭ, pli bone, en faktojn: ni kunlaboru kaj pacience atendu.

La dua Tonkina kampo, instruado, aspektas pli febla, ĉar por bone lerni lingvon necesas bonaj lerniloj: ili mankas en pluraj lingvoj, ĉefe en modernaj versioj (vidbendoj, )

Honora Membraro atingis 60

La Honora Patrona Komitato, en kiu membras eminentuloj grave servintaj la E-movadon kaj mem parolantaj E-on, nombras nun 12 anojn. Kvar novaj nomoj kreskigis la eliton teamon de Honoraj Membroj al sesdekopo. (La eventuala dua jarcifero post la nomo rilatas la esperantistigon.)

Nova Honora Patrono



PROF. JOHN C. WELLS (1939, 1955). Profesoro de fonetiko en la Universitato de Londono kaj estro de la Departemento de Fonetiko kaj Lingvistiko

en Universitata Kolegio Londono. Membro de la Brita Akademio. Estis sekretario de Internacia Fonetika Asocio kaj redaktoro de ties revuo. Ofte

kontribuas al BBC kaj aliaj stacioj de televido kaj radio. Konata aŭtoro en la angla kaj Esperanto, i.a. de la vortaro *Teach Yourself Concise Esperanto-English Dictionary*, de *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, kaj de verkoj pri prononcado, *Accents of English* kaj *Longman Pronunciation Dictionary*. Wells lekciis laŭinvite en pli ol 30 landoj, ankaŭ en multaj UK-oj. Komitatano (1963-74, 1989-) kaj prezidanto (1989-95) de UEA, akademiano (1970-). Dum multaj jaroj li prezidis la Londonan Esperanto-Klubon.

Novaj Honoraj Membroj



Ivo BOROVEČKI (1924, 1940), Kroatio. Doktoro, radiologo, kontraŭfaŝisma batalanto en la dua mondmilito, kroata parlamentano (1963-65). Prezidis Jugoslavian Esperanto-Federacion (1950-53), LKK de la Zagreba UK (1953) kaj la tian E-societon Bude Borjan (1955-56). E-redaktoro kaj parolisto de Radio Zagrebo (1953-56), E-lekciisto ĉe la Ekonomika Fakultato en la sama urbo (1955-56). Prezidis la E-societon en Pula kaj gvidis kursojn tie. Multjara komitatano kaj delegito de UEA. Kunredaktoro (1947-50) de *La Suda Stelo*. Liaj tradukoj el la kroata poezio aperis en diversaj Esperantaj gazetoj kaj antologioj.

☞ kompaktdiskoj, Interretaj kaj korrespondaj kursoj). Ke UEA devas helpi en la realigo de taŭgaj projektoj ĉefe por malmulte disvastiĝintaj lingvoj, eĉ se ne nepre kiel eldonanto, ŝajnas evidenta afero.

Bremsoj

En la plenumo de sia rolo, nia Asocio suferas pro kelkaj bremsoj. La plej videblaj estas eble tri:

1. nekontentiga funkciado de ĝiaj gvidaj kaj administraj organoj;
2. pezaj administraj kostoj;
3. nekunlaboremo kun eksteraj iniciatoj.

Koncerne la organojn (Komitato, Estraro), ŝajnas al mi ke ili laboras malvigle kaj konfuzas decidajn kaj plenumajn taskojn; estraranoj ofte preferas lasi siajn respondecojn al oficistoj, kiuj devas agi sen klaraj direktivoj. Malgraŭ tio, neniu zorgas pri revizio de la asociaj labormetodoj. Nur unufoje startis kaj tuj mortis teknika reformo (Szabó-Felső) de la estrara tagordo; samo okazis al iniciato pri la interna informado (Wensing).

La administra aspekto montras pozitivan tendencon, ĉar unufoje oni rajtas esperi ke la longa serio da planitaj kaj buĝetitaj deficiitoj direktiĝas al definitiva malapero: ĝuste kiel decidis la Komitato en 1993. Restas la

malekvilibro inter kotizoj (55,6% de la rimedoj en 1996) kaj jaraj kostoj (67,3% nur por salajroj, elcentaĵo escepta eĉ ĉe multlingvaj interregistaraj organizoj: tio ne signifas ke la individuaj salajroj tro altas, sed ke la oficeja strukturo estas pli peza ol ni povas elteni). Kompreneble, pravus tiuj kiuj opinias ke la kotizoj ne kovru ĉiujn kostojn kaj servojn; spite al tio, la malekvilibro montriĝas tre serioza kaj instigas al korektoj, kiuj liberigu pli da financaj rimedoj por la ekstera agado de UEA. Pri la supraj kaj aliaj temoj, en 1987 mi submetis plurajn proponojn en mia dokumento citita en la artikoloj de Tonkin.

Ni alvenis al la sinteno de UEA fronte al eksteraj poresperantaj iniciatoj. "Ne nur ni ne bremsu iniciatojn ekster UEA, sed ni aktive helpu krei kondiĉojn en kiuj tiuj iniciatoj povas okazi" — admonas Tonkin. Bremsadoj efektive okazis kelkfoje en la pasinteco. Jen epizodoj: konstruaj kritikaj artikoloj estis ade malakceptataj; estis rifuzitaj du helpopetoj, je ŝarĝo de la Propaganda Konto aŭ de regionaj fondaĵoj, por disvastigi favorepreze hispanan lernolibron en Latin-Ameriko kaj por eldoni bosnian lernolibron; fine, okazis rifuzo simple aŭspicii gravan iniciaton de ERA: komuniko en malagrabla stilo akompanis la malakcepton.

Laŭ opinio de la skribinto, en multaj kazoj netan rifuzon de kvalifikitaj proponoj povus anstataŭi pli pozitiva kaj kompromisema sinteno, pli atenta pristudo de la propono mem aŭ kreiva kontraŭpropono flanke de organoj de UEA.

Nova internacia lingva ordo

Corsetti realisme akcentas ke en nia informado ni adoptu la devizon kaj argumentadon de lukto por nova internacia lingva ordo²; la vojo prezentas la avantaĝon postuli la respektan de principoj universale agnoskitaj en pluraj interŝtataj dokumentoj, inkluzive de la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Intertempe, administrado kaj internaj rilatoj pliboniĝu: UEA akceptu kritikojn kaj malegoisme pretu kunlabori kun ĉiuj iniciatoj en etoso de unueco, en kiu idealaj kunpuŝiĝoj ne eliru el la kadro de simpla diskutado. Tian UEA ni ĉiuj plene subtenu.

Gian Carlo Fighiera (Italio)

NOTOJ

1. *Esperanto preter la jaro 2000 (Temoj por publika informado pri Esperanto)*. Gian Carlo Fighiera. La aŭtoro, 1995. 57p. 30cm. Raporto al la 2-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso, Parizo, 1995. 15,00 gld.

2. La samon proponis la Kongreso en Torino en 1991 kaj la raporto citita en noto 1.



DONALD BROAD-RIBB (1933, 1946), Usono/Aŭstralio. Doktoro pri filologio de la hebrea, arama kaj araba lingvoj. Redaktis la gazetojn *Kristana Bulteno* (1956-60),

Nord-Amerika E-Revu (1959-62), *Biblia Revuo* (1964-72), kiun li mem fondis, *La Nigra Cigno* (1980-88), kaj *Esperanto sub la Suda Kruco* (1989-). Tradukoj: *La respubliko* kaj *Kratilo* de Platono, *Eposoj el antikva Ugarito*, *Alico en Mirlando* kaj *Trans la spegulo* de Lewis Carroll, *La mirinda sorĉisto de Oz* kaj 13 aliaj eroj de la Oz-serio. Amase artikolis kaj tradukis, interalie plurajn manuskriptojn el Qumran (*La Mortmaraj rulaĵoj*). Membro de la Akademio de Esperanto (1972-81, 1992-).



JADWIGA GIBCYŃSKA (1924, 1963), Pollando. Profesia aktorino diplomita en 1959, ŝi laboris en multaj polaj teatroj kaj teatraĵensembloj. Lerninte la lingvon, ŝi tuj

dediĉis sin al aktorado en Esperanto, premierante en la Haga UK (1964) per *Vojaĝo al verdaj ombroj*, ripetita en la UK de Tokio (1965). Poste ŝi aktoris aŭ deklamis en la UK-oj en Budapeŝto (1966), Kopenhago (1975), Lucerno (1979), Vankuvero (1984), Varsovio (1987), Tampere (1995) kaj Adelajdo (1997), kaj gastis krome en deko da eŭropaj landoj, Japanio kaj Kanado. En Pollando ŝi teatis preskaŭ ĉie kie agadas esperantistoj. En Svedio ŝi turneis en lernejoj kun fikcia rakonto pri atom-

eksplodo, kun samtempa traduko en la svedan. Ŝi instruis E-on rektmetode en pluraj landoj. En 1996 ŝi ricevis premion de Fondaĵo Grabowski.

LIISI OTERMA (1915), Finnlando. Esperantistiĝis fine de la dua mondmilito, instigite de prof. Yrjö Väisälä, ŝia instruisto (malkovrinto de la asteroidoj Esperanto kaj Zamenhof), kies posteulo ŝi estis kiel profesoro pri astronomio en la Universitato de Turku (1962-78). Krom multaj asteroidoj, ŝi malkovris tri kometojn, el kiuj la plej fama estas Oterma (1943). Ege modesta persono (tiom ke ni eĉ ne posedas ŝian foton), ŝi komplete dediĉis sin al scienca esplorado, evitante estrarojn kaj aliajn postenojn movadajn. Ŝi multe kontribuis al la prestiĝo de Esperanto en sia medio, uzante ĝin en astronomiaj konferencoj kaj sciencaj publikigaĵoj. ★

EKSTERAJ RILATOJ

UEA en nova lingva konsilio

Pluraj eŭropaj universitatoj kunstarigis ĉi-jare internacian asocion, en kiu membras altnivelaj instancoj lingvo-edukaj.

Al ĉi tiu asocio, Eŭropa Konsilio por Lingvoj, UEA aliĝis kaj sendis min kiel reprezentanton al ties unua konferenco (Lille, Francio, 4-6 jul.), kiun morale kaj finance subtenis la Eŭropa Komisiono. Partoprenis ĝin ĉ. 300 personoj el tuta Eŭropo.

En informbulteno la iniciatintoj klarigis ke, laŭ ekspertoj, multlingvismo ja defias la eŭropajn civitanojn kaj edukistojn, tamen estas atingebla celo. (Laŭ la Eŭropa Komisiono ĉiu civitano lernu almenaŭ du lingvojn krom la propra.) Laŭ la iniciatintoj la ideo ke unu (komuna) lingvo por la civitanoj sufiĉas, estas danĝera obstaklo survoje al multlingva kaj multkultura Eŭropo.

La nova Konsilio funkcios kiel reto por siaj membroj rilate lingvojn kaj kiel forumo por novaj projektoj pri edukado, instruado kaj esploro.

El la sep konferencaj laborgrupoj mi partoprenis tiun pri "multlingvismo kaj regionaj lingvoj", informante pri lernejoj eksperimentoj kaj instruistaj spertoj laŭ kiuj logika planlingvo kiel Esperanto helpas sukcesan

lingvan orientadon, sekve rapidan kaj pli efikan lingvolernadon. Mi proponis organizi samspecajn eksperimentojn, sed ĉi-foje Eŭrop-skale. La Laborgrupo pri la lingvo-problemo en EU ja por tio ellaboris la projekton NEIGHBOUR. Hazarde, ankaŭ samgrupano Luigia Acciaroli (Tria Roma Univ.) substrekiis la propedeŭtikan valoron de E-o. Rezulto: la fina konferencraporto mencias ĉi lastan nocion.

Tio montras la gravecon de partopreno en oficialaj konferencoj pri la lingvo-problemo aŭ ties aspektoj. Persona ekzemplo: mi prelegis pri

"Esperanto kiel dua lingvo apud la gepatra" en la konferenco "Nacioj kaj lingvoj kaj la konstruado de Eŭropo" (1994, Universitato de Loveno, Belgio) kaj en la 6-a Internacia Konferenco pri Minoritataj Lingvoj (1996, Gdańsk, Pollando). La organizintoj de ambaŭ ne nur disvastigis la prelegresumojn, sed ankaŭ eldonos kompletan prelegaron.

Ĉi tiu revuo kaj aliaj E-gazetoj bone informas pri konferencoj en Esperantio mem. Tamen, ni ege bezonas antaŭinformadon ankaŭ pri ekster-Esperantiaj konferencoj rilataj al la lingvo-problemo kaj ties aspektoj, por ke ni povu frue kaj efike kunordigi nian partoprenon. Jen kampo de aktiveco kiu devus esti ero de Kampanjo 2000!

Hans Erasmus (Nederlando)

Jam 117 EP-anoj atentis Esperanton

Dank' al la informa kaj koresponda agado de Germain Pirlot (Steenbakkerstraat 21, BE-8400 Oostende, Belgio) kaj liaj kunlaborantoj, la nombro de eŭro-parlamentanoj pretaj konsideri Esperanton "por helpi al la solvado de la lingva problemo en Eŭropa Unio" kreskis, ĝis la 1-a de septembro, al 117 (18,7% el ĉiuj 626). Ili troviĝas en ĉiuj politikaj grupoj de Eŭropa Parlamento kaj devenas el ĉiuj 15 membroŝtatoj de EU, krom el Grekio. Plej grandnombros la subtenantoj britaj (30) kaj italaj (20), sed proporcie daŭre plej fortas la subtenemo ĉe irlandaj (13 el 15) kaj belgaj (15 el 25) eŭroparlamentanoj.

Pri blokado kaj tabuoj

La tridek-kelkopa publiko dum la kongresa prezento de la "Libroj de la jaro" konsistis preskaŭ duone el la prezentantoj mem.

La kongresanoj ŝajne preferis vidi kaj tuŝi la novaĵojn en la Libroservo, kie ekzemple furoris la UEA-eldonaĵo pri Zamenhof/Esperanto-objektoj *Monumente pri Esperanto*, tiom ke ĝia surloka stoko elĉerpiĝis. Similan sukceson ĝuis ĉiuj verkoj de Trevor Steele. (Furorlisto aperos venontnumere.)

Kvin el la sep prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato aĉetebblas en komuna kajero, jam antaŭ la IKU-prelegoj — anoncis iniciatinto Amri Wandel. Li emfazis ke ĉi tiu unufoja enbroŝurigo devas krei tradicion.

Keiko Syōzi (Libroteko Tokio) kuraĝis publikigi en mil ekzempleroj la novan E-tradukon, fare de Nora Bartels, de la tutmonde konata, kortuŝa dokumento milittempa *Taglibro de Anne Frank*. Ŝia esperantigo baziĝas sur pli aŭtenta kaj ampleksa eldono de la origina manuskripto ol la unua traduko de G.J. Degenkamp (1959).

El Pollando venis luksa albumo: *Franz Schubert*, kun eĉ kompakta disko. Andrzej Pettyn rakontis ke ĝia lanĉinto Georgo Handzlik, konata pro siaj E-kantoj kiel "la bardo sen barbo", de 1990 sukcese eldonadas pollingve, ekz. verkojn de István Nemere. Ĉe la firmao KLEKS (pole: "inkomakulo") de Handzlik estas eble "haltigi la maŝinon" post miloj da pollingvaj ekzempleroj de iu verko, kaj tuj produkti centojn da ĝia E-varianto. Tiel okazis ankaŭ al la riĉe ilustrita fabelaro *Kiel ĉiuj katetoj* (1993).

La esperantistoj ne sufiĉe uzas sian lingvon por teknikaj celoj — opinias Gilbert Ledon (Brazilo), kiu tial lanĉis la serion "Teknikaj kajeroj". Post *Familia lingvo: Esperanto* pri esperant-lingva edukado de infanoj, kaj *Manekenoj kaj ni* pri fabrikado de manekenoj, venis *Anarkia konstruo*. Al homkonforma sociordo pri la efektivigebleco de anarkiismo, kaj sekvas broŝuro pri pumpiloj. Ekster tiu serio Ledon verkis kaj aperigis *Analoj de EASP*, pri la San-Paŭla movadhistorio.

Post prezento de referaĵaro memore al prof. Szerdahelyi, *Struktura kaj socilingvistika esploro de Esperanto* (red. Ilona Koutny kaj Márta Kovács), oni transiris al beletraj novaĵoj.



Post traduko el Markizo de Sade (1992), geedzoj Le Puil plu rompadas tabuojn per *La maljunulino*....

POR LA TAGO DE LA LIBRO PROVIZU VIN PER
ESPERANTAJ LIBROJ EN LA URBO DE ERASMO

MALFERMA TAGO

sabaton la 29-an de novembro 1997 (10h00 - 17h00)



★ Paul Gubbins prezentos la televidan serion *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*

★ E-vidbendoj montrataj

★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%

★ Specialaj ofertoj

★ Senkosta loterio

★ Bazaro de esperantaĵoj

★ Kafo kaj teo senpagaj

Loko: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam

Petro Chrdle (KAVA-PECH) kunportis al Adelajdo, pro singardemo, nur unusolan ekzempleron de *Sonĝonovelo* de Artur Schnitzler (tr. Michel Duc Goninaz). Chrdle klarigis ke li devas bloki sian stokon ĝis la jaro 2002, ĉar pro malfrue rimarkita aŭtorrajta problemo li ne rajtos pli frue surmerkati ĝin tutmonde.

Sekvis du prozaj volumoj por ne ĉies gusto. Konforme al sia nekonformismo, la eldonantoj de la ajnista revuo *La Kancerkliniko*, geedzoj Le Puil, elfrancigis verkon kiu rompas lingvaj kaj morajn tabuojn: la romanon *La maljunulino kiu paŝis en la maro* de San-Antonio. Simile, la freŝa novelaro *Ekstremoj* de la ibera kvaropo Miguel Fernández, Jorge Camacho, Gonçalo Neves kaj Liven Dek pri temoj kiel aidoso, malfidelo, sinmortigo aŭ unua amorsperto, povas kelkloke ŝoki eĉ harditajn legantojn.

Spomenka Ŝtimec kunhavis specimenajn ekzemplerojn de angle-Esperante dulingva kajero kun sia novelo *La aŭstralia pupo*, kiu ankoraŭ serĉas eldoniston. Ŝi prezentis ankaŭ *Antologio de kroataj unuaktaj dramoj*, ĵus lanĉitan por la Unua Kongreso de la kroataj e-istoj. Dek unuaktaĵoj ekde la mezepoko ĝis la nuno estis tradukitaj de sesopo, i.a. la nova Honora Membro Ivo Borovečki. Vida Jerman, kiu laŭtleĝis fragmentojn el la antologio, prezentis ankaŭ sian kasedon *Teatra vespero*, kun la muzik-poezia recitalo *Izolulo* kaj la monologo *Inventante ke mi sonĝas*.

Dum posta diskuto evidentiĝis ke E-libroeldonado malofte donas profiton, sed ke profesiaj eldonejoj, kiel KLEKS, povas enŝovi E-varianton en sian produkto-procezon; ke surmerkato funkcias bone se oni reklamas plej rekte je persona nivelo, ekz. en kluboj; kaj ke necesas atenti la leĝojn pri kopirajtoj, kiuj povas malsami de lando al lando.

István Ertl

Pli da premiotoj preferataj

La sekretario de la Konkursoj, Osmo Buller, rivelis al trideko da interesatoj en Adelajdo atentindan interrilaton: ju malpli granda la Universala Kongreso, des malpli da homoj sendas siajn verkojn al la Belartaj Konkursoj de tiu jaro.

Malgraŭ ke, evidente, oni ne bezonas aliĝi al UK, eĉ ne kotizi al UEA, por provi sian verkforton en la Konkursoj. Necesas nur talento. Kiel ajn, la Adelajda rikolto ne estis tre riĉa: 76 konkursaĵoj (dum en averaĝa jaro venas pli ol cento), el kiuj 15 meritis premion aŭ honoran mencion. Tri el ili estis voĉe prezentitaj: István Ertl laŭtlegis sian poemon *Herbokanto*, Vida Jerman la novelon *Pli ol nura lumo* de Sabine Trenner, kaj Osmo Buller parton el la eseo *La spirito de Esperanto kaj la 'samideanaj' malamikaĵoj* de Ignat Bociort.

Kvar branĉoj orfis ĉi-jare sen unua premio, kvazaŭ la ĵurianoj afablus ne ekskludi iun ajn el venonta konkurado. (Laŭ la reguloj, gajninto de unua premio en iu branĉo ne rajtas partopreni sambranĉe dum la tri sekvaj jaroj.) Pluraj laŭreatoj ja premieris en BK, sed jam la duan

jaron ne aperis Nova Talento, t.e. elstara aŭtoro premiita nek pli frue nek samjare. Tiuj negativaĵoj agordas nin al la bedaŭroplenaj vortoj de unu el la juĝantoj pri poezio: "Kial niaj bonaj poetoj ne plu partoprenas? Ekzemple, estas laŭ mi simple skandale ke N.N. neniam gajnis la unuan premion." Cetere, la sama ĵuriano, ĉiujare rigor-humora, opiniis eĉ pri la plej bonaj (!) poemoj de BK '97: "ja malstereotipaj, sed, ĝenerale, nur kaosa pelmelo de neklaraj pensoj, pseŭdointelektaj aludoj, bizaraj tropoj, fuŝavangardaj



Vinko Ošlak premiĝis en la malfacilaj branĉoj esee kaj teatra.

aŭdacoj, plej ofte esprimitaj per stumblaj, malmuzikaj ritmoj." Kontraste, juĝanto pri prozo jubile konstatis ke la 12 plej bonaj verkoj (do, pli ol duono de ĉiuj senditaj) estus legindaj ankaŭ en nacilingva gazeto. La partopreno en aliaj ĝenroj estis tiel magra ke konkludoj pri kvalito ne multon dirus.

Iom da statistiko: El la 10 ne-teamaj premiitoj 4 estas virinoj (3 prozistoj!): la plej alta nombro de post 1988. Ne malpli ol tri premiitoj loĝas en Berlino: ĉu stimule por 1999, kiam la UK gastos tie? Se jam paroli pri geografio: plejpartego de la premiitoj (10 el 12) radikas en Orienta aŭ Meza Eŭropo, kaj nur unu — brazilano — venas el alia kontinento. (En la pasintaj jaroj ĉiam atutis Okcidenta Eŭropo, kaj premiigoj alikontinentaj estis neproporcio maloftaj.) Fine, se vi volus kalkuli la probablon de via premiigo en venonta BK, sciui ke en 1994, 1995, 1996 kaj 1997 sendiĝis resp. 57, 120, 109 kaj 76 konkursaĵoj, el kiuj 13, 24, 17 resp. 15 estis iel distingitaj.

REZULTOJ DE BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1997

POEZIO: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: István Ertl (Nederlando) pro *Herbokanto*. Tria premio: István Ertl pro *Pri fuŝpoemoj honteme pruntitaj por opinio*. Honora mencio: István Ertl pro *La reportero silentas*. Partoprenis 38 verkoj de 17 aŭtoroj el 10 landoj.

PROZO: Unua premio: Sabine Trenner (Germanio) pro *Pli ol nura lumo*. Dua premio: Júlia 'Sigmond (Rumanio) pro *Kiam mi pardonis al la kato?* Tria premio: Lena Karpunina (Germanio) pro *Jaŝa*. Honora mencio: Sten Johansson (Svedio) pro *La naskiĝtaga donaco kaj Dufoja ekspono*. Partoprenis 21 verkoj de 12 aŭtoroj el 10 landoj.

TEATRAĴO: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: ne aljuĝita. Tria premio: Vinko Ošlak (Aŭstrio) pro *Ŝakludantoj (Diabla tragedio en tri aktoj)*. Partoprenis 3 verkoj de 3 aŭtoroj el 3 landoj.

ESEO: Unua premio: (Luigi Minnaja): ne aljuĝita. Dua premio: Vinko Ošlak (Aŭstrio) pro *La homo serĉas sian imagon*. Tria premio: Ignat Bociort (Rumanio/Germanio) pro *La spirito de Esperanto kaj la 'samideanaj' malamikaĵoj*. Partoprenis 5 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj.

KANTO: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: Flávio Fonseca (Brazilo) pro *Misarujo*. Tria premio: Olga Semjonova kaj Jevgenij Ĥabarov (Rusio; teksto resp. muziko) pro *Du semajnoj de l' feliĉo*. Partoprenis 6 kantoj de 6 aŭtoroj aŭ aŭtorduopoj el 5 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO: *Al la mondo donace. Antologio de la serba porinfana poezio*, elektita kaj tradukita de Zlatoje Martinov, eldonita de Strategia (Beogrado, Jugoslavio). Partoprenis 2 libroj de 2 eldonejoj el 2 landoj.

VIDBENDO: Unua premio: Laŭzana E-Societo (Svislando) pro *La Alpoj sviasj*. Partoprenis 1 vidbendo.

Poezio, Honora mencio:

ISTVÁN ERTL

La reportero silentas

Nu jes ja, ĉiu kredis saman kredon tiuepoke.

Da tiuj kiuj forrifuzis predon estis tre poka.

La justo ankaŭ tiam portis maskon — vi volis juston.

Vi kultis flagon, krucon, stelon, faskon — vi havis guston.

Vi sidas nun en ĉambro luksamebla kaj rememoras.

Kased' registras, mi silentas febla — ĉi ĉio foras.

Ĉesante aŭdi, se mi min imagas — vertiĝa ludo — en tiu inta temp': mi same agas kun plaĉa krudo.

Kaj dum mi tenas al vi mikrofonon, pri via vivo honte ekenvia, registras jam la bend' alian tonon: la voĉo estas mia.

KOTIZTABELO DE UEA POR 1998

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	28	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	260	650	410	250	1300
Belgio/franko	300	760	1900	1210	730	3800
Brazilo/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Bulgario/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104
Ĉeĥio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Danio/krono	55	140	350	225	130	700
Finnlando/marko	45	110	275	175	105	550
Francio/franko	50	120	310	200	120	620
Germanio/marko	15	37	92	58	35	184
Greklando/drakmo	1500	3800	9600	6100	3700	19200
Hispanio/peseto	900	2300	5700	3600	2200	11400
Hungario/forinto	850	2200	5400	3200	1900	10800
Irlando/pundo	6	14	36	23	14	72
Islando/ <i>guldeno</i>	16	41	103	62	37	206
Israelo/ <i>guldeno</i>	13	34	84	50	30	168
Italio/liro	13000	34000	84000	53000	32000	168000
Japanio/eno	1100	2900	7200	4300	2600	14400
Kanado/dolaro	13	32	81	49	29	162
Korea Resp./ <i>guldeno</i>	13	32	81	49	29	162
Nederlando/ <i>guldeno</i>	16	41	103	66	39	206
Norvegio/krono	60	160	390	230	140	780
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	34	190
Pollando/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104
Portugalia/eskudo	1000	2600	6400	4000	2400	12800
Rusio/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104
Slovakio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Sud-Afriko/ <i>guldeno</i>	15	37	92	55	33	184
Svedio/krono	70	160	400	250	150	800
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/ <i>guldeno</i>	11	27	68	41	25	136
TARIFO B/ <i>guldeno</i>	8	21	52	31	20	104

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Kvodlibeto

La Internacia E-Konferenco (12-18 jul., Rafina, Grekio) aljuĝis la OSIEK-premion '97 al Fernando de Diego pro lia traduko de *Cent jaroj da soleco* de Gabriel García Márquez. (M. de Zilah)

Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer prelegis pri "E-literaturo, fenomeno unika en la mondo" en prestiĝa literatura festivalo internacia (12 sep., Mantova, Italio). Tuŝinte en sia prelego la malfacilon traduki la lokan aŭtoron Teofilo Folengo, Minnaja estis petita doni tri intervjuojn. Samtage, en la proksima Sabbioneta, vespera festo honoris la italan poeton Mario Luzi: i.a. Perla Martinelli prezentis la E-lingvan *Dekameronon*, prefacitan de Luzi. (*La Eta Gazeto*, C. Minnaja)

De pli ol sep jaroj funkcias ĉiumonata Moskva Literatura E-klubo. MLEK aperigis jam 46 kajerojn de sia bulteno *Cerbe kaj kore* kaj formis la poetojn Klara Ilutoviĉ, Ivan Naumov kaj Grigorij Arosjev. (*Ruslanda E-isto*)

Wouter Pilger malfermis E-literaturan TTT-kafejon ĉe <http://www.digicron.com/kafejo>. Ĉe <http://www.geocities.com/Paris/8059> hejmas — ankaŭ zorge de Pilger — la mezepoka franca poeto Villon. La tieaj tradukoj de F. Gaulthier legeblas ankaŭ en *Fonto* (majoj).

La argentina verkisto Hugo Wast (1883-1962) priskribis en la romano *Juana Tabor* — 666 (1941) mondon ne multe diferenca de la nuna, prognozante ekz. Interreton. La libro antaŭvidas la stariĝon de unueca mondordo, kun unu monspeco kaj unu lingvo: Esperanto, menciita 15 fojojn en la libro. (*Argentina E-vento*)

Inter la 38 verkoj (el 7 landoj) kiuj alvenis por la konkurso Liro-97, anoncita de *Ruslanda Esperantisto* kaj *La Ondo de Esperanto* (vd. jun., p. 118), la juĝkomisiono (G. Gazizi, A. Korĵenkov, N. Lozgaĉev) trovis la plej bonajn "Vortaro de tradukisto" de Gennadij Kulagin (prozo), "Kiel rekonila amon?" de Klara Ilutoviĉ (poezio) kaj "Ĉu povas fil' de suda ardo..." (poemo de Ilja Erenburg, tradukis Valentin Melnikov). Konkurso ne okazis en la branĉoj traduka prozo kaj recenzo pri la poemaro *Kvarteto*; la po unu partoprenintoj I. Lukoŝeviĉ kaj Valentin Melnikov ricevis tamen laŭdan mencion. (H. Gorecka)

Kiu spertis, revenas

Kvankam Adelajdo malhavis Infanan Kongreseton, ne mankis someraj aranĝoj porinfanaj: la 19-a Renkontiĝo de E-Familioj (26 jul.–2 aŭg., Savudrija, Istrio, Kroatio) kaj la sekva Familia Fериado.

Laŭ invito de Ankica kaj Kruno Tišljar, 19 E-parolantaj familioj renkontiĝis en porinfana tendumejo tuj apud Adria Maro cele al sunbaniĝo, turismado kaj amikado. Nombriĝis 35 infanoj el 12 landoj, kun 11 lingvoj.

La ĉiutaga programo — nek rigora nek deviga — aspektis jene: matena gimnastiko, (instigo al) lavado, matenmanĝo, kantado, sunbano, tagmanĝo, manlaboro, sunbano, vespermanĝo, interparolado kaj prelego; kompreneble, aldoniĝis diversaj ekskursoj. En la vesperoj prelegis, krom la ĉeestantoj, István Nemere (pri sia senĉesa verkado) kaj Spomenka Štimec (pri la ĵusa UK kaj pri sia verkaro).

Dum aŭskultis la plenkreskuloj, la infanoj amuziĝis laŭ propra imago-povo. Iun vesperon ili aviadile trafugis la tutan mondon. Je ĉiu “alteriĝo” ĉiu pasaĝero, de la plej etaj ĝis la 12-jaraj, devis forlasi la aviadilon kaj serĉi “monerojn” (strobilojn, nuksojn...) taŭgajn por la nova lando. Amuza ludo, miriga sperto por la gepatroj.

REF estas — en mia sperto — pli-malpli la nura renkontiĝo kie junaj denaskuloj povas rekte sperti ke ankaŭ aliaj infanoj uzas E-on, kaj kie gepatroj povas diskuti pri du- aŭ plurlingva edukado kaj pri uzindaj terminoj. (Ĉi tio des pli gravis ĉi-jare ĉar ni kune pridiskutis la finpre-

paron de E-bildvortaro por infanoj, kiun kroata eldonejo lanĉos ankaŭ kroatlingve.) Bedaŭre, do, ke la unika REF restas iom nekonata ekster la tradicia rondo de la partoprenantoj; fakte, nur tri el la ĉi-jaraj familioj ne estis REF-veteranoj. Kiu spertis, revenas.

La jubilea, 20-a REF okazos julie, en sia devenlando Hungario, en Moŝonmagyaróvár (proksime al Vieno).

Laŭ raportoj de Guido Van Damme (Belgio) kaj Stefan MacGill (Hungario)



En REF oni eĉ konstruas kastelon.

Tri aranĝoj en familia etoso

Ne unu, sed tri aranĝoj okazis ĉe la Universitato de Valencio (8–13 jul.) sub honorprezido de la hispana reĝino Sofia.

Al la 7-a Internacia E-Kongreso, 7-a Eŭropa E-Forumo kaj 56-a Hispana E-Kongreso aliĝis 565 homoj el 18 landoj, sed partoprenis pli ol 600.

La kongreson plej karakterizis familia etoso, elstare en la vilago Cheste, kies loĝantoj tuttage gastigis la kongreson. Tie okazis prelegoj, koncertoj, premiado de la verkistoj Antonio Marco Botella, Kurisu Kei kaj Sabira Ståhlberg, diservo kun diverslandaj ĥoroj, subĉielaj muzikado de E-grupoj kaj manĝado de giganta paeljo.

La regionaj amasinformiloj reliefigis la abundan artan kaj kulturan programon. Sen mencii ĉiujn erojn: ludis preskaŭ 100 artistoj de 6 trupoj el Pollando, Rumanio kaj Hispanio, kantis 40-membra ensemblo kaj dancis samnombra folkloro grupo infana, ambaŭ el Pollando. Propran muzikon elektronikan aŭdigis Solo (Eduardo Vargas).

La prelegoj tuŝis temojn de juro (R. Uruña), botaniko (M. Zvara), informadiko (M.A. Sancho), Literaturo (M. Gutiérrez, M. Fernández), lingvistiko (A. Alonso), radio (B. Pietrzak) kaj lingvopolitiko (G.C. Fighiera, Italio). Publikan kurson Cseh-metodan gvidis A. Zachariás. La “ibera skolo” (M. Fernández, J. Camacho, G. Neves, L. Dek) prezentis novajn verkojn. Aparta kunveno omaĝis al la forpasintaj Ada Fighiera-Sikorska kaj Juan Carlos Ruiz.

La urbestro de Valencio, Rita Barberá, akceptis la kongresanaron en la urbdomo kaj legis saluton en E-o.

La kongreson kunordigis Augusto Casquero, Ana Montesinos kaj Gian Carlo Fighiera, kun helpo de multaj samideanoj.

*Augusto Casquero (Hispanio),
prezidanto de LKK*

Lingva egalrajto

La 2-a Eŭropa Esperanto-Festivalo (Budapeŝto, 31 jul. – 6 aŭg.) ĉeftemis pri “Komunikado en internaciaj organizoj”.

Al e-istoj el 8 landoj prelegis i.a. d-ro György Nanovszky (hungara ambasadoro en Rusio), pri la ĉeftemo; d-ro Endre Dudich, pri “Multlingveco en Eŭropo”; Dieter Dungert, pri “La germana kiel internacia komunikilo”; kaj László Gados, pri “Eŭropo kaj Esperanto”.

Konferenca rezolucio, transdonita al Hans Beck, EU-representanto en Hungario, alvokas la estrojn de internaciaj organizoj “fari paŝojn (...) por certigi la egalrajtan lingvouzon” kaj “eksperimente ekuzi ankaŭ la neŭtralan internacian lingvon Esperanto”.

Pri la Festivalo kaj la 110-jara datreveno de la Unua Libro Péter A. Rados kaj Oszkár Princz informis dum 22 minutoj en tutlanda radioelsendo.

Laŭ “Interredaktore”

Esperantaj dialogoj

Du freŝaj filmoj uzas Esperanton: svisa ĉefrole, Holivuda akcesore.

Esperante parolanta mallonga filmo, *La eta knabino*, de la konata Zurika reĝisoro Samir, prezentigis en la film-festivalo de Locarno (Svislando) la 13-an de aŭgusto. La dialogojn esperantigis Dietrich Weidmann kaj E-societo de Zuriko, kun kontrolo de Claude Piron. (D. Weidmann)

La 24-an de oktobro premieros la Holivuda scienc-fikcia filmo *Gattaca*, verkita kaj reĝisorita de Andrew Niccol. La intrigo: En socio de genetike planitaj homoj la nature naskita Jerome (Ethan Hawke) ŝajnigas sin membro de la genetika elito por partopreni spacvojaĝon. Tamen, unu semajnon antaŭ la misio, levigas duboj pri lia origino, kaj eĉ la kolemino al kiu li enamiĝis (Uma Thurman) eksuspektas pri lia trompo.

Dank'al perado de la kontrolisto de vid-efektoj, Chris Watts, la filmo, produktita de Columbia Pictures, uzas

Esperanton en iuj dialogoj: nia lingvo sonas precipe per laŭtparoliloj en la halegoj de la Gattaca Aerkosma Korporacio, kun la imponaj voĉoj de Marisa John kaj de Miko Sloper, oficisto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko. ★



FAKAJ ASOCIOJ

Integriĝo aŭ izoliteco?

"Esperanto — integriĝo aŭ izoliteco?" — 84 personoj el 13 landoj serĉis respondon al la tema demando de la 63-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj (Irpinj apud Kievo, Ukrainio, 5-12 julio).

La prezidantino de Ukraina Blindul-esperantista Asocio, Ludmila Galicka, bonvenigis ĉiujn al la kongresejo, kiu alie servas kiel ripozloko por verkistoj. Salutis la ĉefredaktoro de brajlaj periodaĵoj en Ukrainio, I.V. Taran, kiu dum posta ekskurso al lia redakcio multe rakontis pri la blindula vivo en la lando. Salutis ankaŭ KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo, Japanio) kaj, per kasedo, nome de UEA, ties ĝenerala sekretario Michela Lipari. Ĉeestis kelkaj vidantaj esperantistoj, membroj de la klubo Ora Pordego el Kievo. Dumkongrese asistadis vidantaj samideanoj, i.a. Boris Zozulja kaj la ĉefdelegito de Ukrainio, Dmitrij Cibulevskij.

Viglan interŝanĝon de ideoj instigis Cibulevskij per sia prelego pri la kongresa temo. Carla da Costa (Italio) rakontis pri imitinda iniciato: en senluma, speciale aranĝita spaco vidantoj povas sperti proprasente la vivon de blindulo. Nora Moerbeek raportis ke simila aranĝo sur ŝipo estis vizitebla

en Nederlando. (Kaj en pluraj aliaj landoj eŭropaj, i.a. en Hungario — *Red.*) Anna Rabec (Rusio) rakontis kiel ŝi, instruanta internacian juron, sukcesis influi la pensadon de siaj studentoj per esperantismaj ideoj, malgraŭ la spirita vakuo kiu karakterizas la nuntempan socion en Ruslando. Ella Ruban (Ukrainio) emociis per rakonto pri sia vivokrizo, subita blindiĝo, post kiu Esperanto montriĝis ŝia sola savilo. Raporteto sciigis pri la funkciado de Esperanto en internacia

konferenco pri brajlo. (Vd. jul.-aŭg., p. 127.) Prelegis pri la ukraina historio Petro Snypir, same kapte pri ukraina muziko la dutaga esperantisto Mikaelo Komai.

En sesio de UEA/ILEI-ekzamenoj, gvidataj de Nora kaj Rob Moerbeek, sukcesis tri kandidatoj, unu je elementa kaj du je meza nivelo.

Ekskursoj kondukis al subĉiela etnologia muzeo kaj al Kievo, kie oni vizitis la du ĉefajn katedralojn kaj la Oran Pordegon.

La 64-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj okazos verŝajne apud Bordo (Francio), antaŭ la UK.

Laŭ raporto de Nora Moerbeek, sekretario de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)

Helpo donita, helpo serĉata

Inter la jugoslaviaj partoprenantoj de la 63-a IKBE estis la 16-jara Branka Pešić el Čačak kun sia akompananto, la 14-jara frato Mirko. Ilian vojaĝon helpis la jugoslavia flugkompanio JAT (senpaga flugo), la Blindula Ligo de Serbio (kotiz-pago) kaj la komunumo Čačak, kiu kun tri entreprenoj kovris la ceterajn vojaĝelspezojn, post petskribo de Jugoslavia E-Ligo iniciatita de Etelka Kiš-Jakupović. Pri la aranĝo raportis la lokaj gazeto *Čačanski glas* kaj televido Spektrum. Nun estas serĉata monhelpo (pere de la UEA-konto "jajt-s" de Jacques Tuinder) por havigi manprotezojn al Branka Pešić, kiu perdis ambaŭ manojn kaj la vidkapablon antaŭ sep jaroj, pro eksplodo de bombo el la dua mondmilito. (*InfoSEL*)

Pasporto al la reala mondo

La Estraro de UEA aŭspicias, Fondaĵo Saliko subvencias (20 mil gld.) "Esperanto, pasporto al la tuta mondo", televidkurson kreatan en Usono. Ni intervjuis la scenariston, Paul Gubbins.

Farata de profesia skipo, ĉi tiu rektametoda televida kurso por plenkreskuloj konsistos el 15 duonhoraj lecionoj kaj taŭgos por tutmonda uzo. Kiel progresas la projekto?

La kompleto haveblas laŭplane post tri jaroj. Tamen, la unuaj kvar lecionoj pretos jam antaŭ la fino de 1997. Ĉi tiujn mi verkis rapide, ekde lasta Kristnasko ĝis pasko. Tiam mi invitiĝis por tri semajnoj al Kalifornio por preparoli la projekton kun reĝisoro Judy Montell kaj kelkaj aktoroj, kaj modifi la dialogaron surbaze de voĉlego. Somere la skipo povis labori jam sen mi. Venontan someron mi ĉeestos la filmadon kaj surloke konsilos — plej verŝajne ĝenos! — la reĝisoron.

Kion vi povis utiliĝi el via didaktika sperto? Vi ja aŭtoris la sukcesan lernolibron Kunvojaĝu.

Multe. Mi scias, ekzemple, ke oni enkonduku ĉiulecione nur unu-du novajn gramatikaĵojn kaj multe ripetu — sed ĉiam malsame. Mi volas, samkiel en *Kunvojaĝu*, ke la lingvo estu tuj aplikata, praktika kaj freŝa. Gravas humuro, vigla intrigo kaj amuzaj roluloj (la familio Bonvolo kaj ĝiaj gastoj). Mi volas instrui, krom la lingvo, iom pri niaj kulturo, valoroj kaj sintenoj. Utilas ankaŭ mia teatra intereso. Fakte, mi nun laboras por magistriĝi pri verkado de radio- kaj televid-scenaroj. Do mi ja scias, almenaŭ teorie, kio necesas por sukcesa televidserio...

Via teatraĵo Noemi (sep., p. 151) kreiĝis kunlabore kun la aktorino.

Mi komprenas ke simile okazas kun Pasporto.

Jes, mian scenaron komentis kaj kritikis ne nur ĉiuj skipanoj, sed ankaŭ la profesia reĝisoro. La tuta dialogaro kaj intrigo sublupeigis... ĝojinde, ĉar tiel okazas en ĉiu televidejo, radiejo kaj teatro tutmonde, prepare al la fina

trovis kapablan, internacian E-rondon (Ionel Oneț, Alexandr Shlyafer k.a.), kiu saĝe konsilis lingve. Ankaŭ la aktoraro estas sufiĉe internacia. Mi certas ke neniam anglismo sentiĝos.

Restas du aferoj direndaj. Unue, kvankam *Pasporto* celas komencantojn, ĝi distros eĉ spertajn e-istojn. Mi volas ke ĉiu spektu ĝin kiel televidan serion, identigante kun la roluloj. Due, *Pasporto*, pli ol 7 horojn longa, estas la plej ambicia dramprojekto iam ajn entreprenita en Esperantujo. Mi ĝojas kaj fieras tiel kerne asociiĝi kun ĝi.



La familio Bonvolo. De maldekstre: malantaŭe Leonora Torres (Meksiko, Patrino), Miko Sloper (Usono, Patro), Svozi Katsunori (Japanio, Raportisto), Vesna Heyman (Kroatio, Butikistino); antaŭe CHIEN Mingchi (Ĉinio, Filino), Jennifer Korp (Usono, Filino), Stephen Boddington (Britio, Filo), Guy Menahem (Usono, Gasto). Ne videblas Steve Wagenseller (Usono, Detektivo).

versio. Tiel *Pasporto* eniras la "realan" mondon... kaj eliras des pli forta.

Brita verkisto kaj usona skipo — ĉu tio ne kontraŭdiras internaciecon?

Tute ne — ĉefe pro la ĵus skizita labormaniero. En San-Francisko mi

Por antaŭmendoj kaj/aŭ donacoj uzu la UEA-konton "nmvm-n". La unuaj kvar lecionoj antaŭmendeblas kontraŭ 85 usonaj dolaroj; la tuta serio kostas US\$300. Informiĝu plu ĉe ELNA (P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono; ☎+1/510/653-0998, ☎653-1468), aŭ retpoŝte ĉe Lusi Harmon (<lusiharmon@aol.com>).

Krizantemo vigligis serban kurson

Esperanto-Ligo de Respubliko Serba (ELRS) organizis Unuan E-Lernejon (12-20 jul.).

En Banja Vrućica (Respubliko Serba parto de Bosnio kaj Hercegovino) dek du E-societanoj partoprenis tage seshoran daŭrigan kurson de Boriša Milićević kaj Radojica Petrović. Aparte spronis ilian parolkapablon ĵurnalistino KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo) el Japanio, kiu, vizitinte pasintjare Kroatian kaj Sarajevon, volis vidi la postmilitan staton nun ĉe la serba

flanko. Krizantemo gastis ĉe esperantistoj en Beogrado, Teslić, Banja Luka, Prijedor, Brčko kaj Čačak, ĉie vigle aktiva per kaj por E-o. En akceptoj ĉe aŭtoritatoj, dum televid- kaj gazet-intervjuoj, en blindul-organizaĵoj kaj infangardenoj ŝi menciis la spertojn de japanoj post la dua mondmilito, kaj ĉiam prezentis la japanan paperfaldan arton *origami*.

La lernejon en Teslić vizitis ankaŭ ne-e-ista delegitaro de la sveda Junulara Konsilio, esplorante kunlabor-eblojn. En Respubliko Serba ilin gastigis aktivaj junularaj agantoj de ELRS.

Ambaŭ vizitoj vekis atenton de aŭtoritatoj kaj amaskomunikiloj, pro la grava kontribuo de E-o al la mildigo de plurjara internacia izoliteco.

Laŭ Radojica Petrović (InfoSEL)

Honkongo: Variaj gradoj de eŭforio

“Esperanto povas fariĝi la Honkongo de lingvoj” — diris iam Umberto Eco. Sed kiugrade Esperanto povas fariĝi la lingvo de Honkongo?

Laŭ afabla permeso de Andreo Pettyn (Pola Radio), ni publikigas redaktitajn erojn de lia intervjuo kun Werner Breitung el Honkongo, reage al la kresko de intereso pro ties re-aliĝo al Ĉinio.

De kiom da jaroj kaj kiel funkcias Honkonga E-Asocio?

Ekzistas kelkaj E-aktivaĵoj en Honkongo jam de multaj jaroj — sed ne konstantaj, ĉar en Honkongo homoj ĉiam iras kaj venas, sen penso pri io krom mono. La novan komencan spronis la kursoj de pola instruisto, Joachim Werdin, komence de la 90-aj. Kun li eklernis kelkaj el la nun aktivaj homoj. En 1994, post kiam alvenis Don Gasper kaj mi, Margaret Fidow kunigis rondon de dek e-istoj por refondi Honkongan E-Asocion.

Ekde tiam ni kunvenas ĉiun duan lundon de la monato kaj multflanke aktivis. La membraro kreskis de 10 en 1994 al ĉ. 40 nuntempe. Ne ĉiuj ĉiam venas, kaj ne ĉiuj bone parolas, sed la nivelo kreskas. Avantaĝe, en nia asocio ne ekzistas komuna gepatra lingvo, do, malfacilas krokodili. Niaj membroj devenas el Honkongo, Ĉinio, Malajzio, Indonezio, Japanio, Nov-Zelando, Britio, Germanio, Bulgario kaj Irano.

Ankaŭ eksterlandanoj ofte vizitas nin. Ekzemple, ĉi-semajne gastas du meksikanoj kaj du francoj. La spaco ĉe niaj du gastigantoj de Pasporta Servo ne ĉiam sufiĉas, ĉar en Honkongo la loĝejoj estas malgrandaj!

De tempo al tempo ni aranĝas kursojn kaj, unufoje jare, ekskursas al najbara ĉina urbo. Pasintjare ni vizitis

la esperantistojn en Guangzhou (Kantonon) kaj ĉi-jare en Zhongshan, okaze de kunveno tie. Al la Unua Azia Kongreso en Ŝanhajo pasintjare ni veturis sesope. En junio ni unuafoje okazigis Esperanto-aranĝon en Honkongo, sur la insulo Cheung Chau: kun 24 partoprenantoj la du kursoj estis plenaj.

Kiel rigardas viaj membroj la estontecon de Honkongo ĝenerale kaj rilate al Esperanto?



Foto: Bill Mak

Ĉiu havas aliajn esperojn kaj vidpunktojn, des pli ke nia asocio konsistas el membroj kaj el Honkongo, kaj el cetera Ĉinio kaj el eksterlando. Ĝenerale en Honkongo oni fidis pri la estonteco de la urbo kaj subtenis la revenon al Ĉinio. Pri tio la esperantistoj ne estas escepto. Ili estas optimismaj, sed la grado de eŭforio varias.

Ankaŭ rilate al Esperanto estas diversaj esperoj. Kelkaj, ekzemple nia

prezidantino Eruda Li kaj nia honora prezidanto LEE Teck Shiu, esperas plian uzon de Esperanto en komercado. Mi persone ne tiom interesiĝas pri komerco, sed mi esperas ke Esperanto povos daŭre kunvenigi homojn el diversaj nacioj en Honkongo kaj helpi al ili kompreni unu la alian. Esperanto estas bona ilo por peri interhomajn kontaktojn en tiom internacia urbo kiel Honkongo. Esperanto po-

“Kune ni kreas pli bonan morgaŭon” — esperis la sloganaj tolbendoj de manifestaciantoj la lastan nokton antaŭ la re-aliĝo al Ĉinio.

vas same esti ponto inter honkonganoj kaj ĉeflanda Ĉinio, kiam la rilatoj pliprofundigos.

Intervjuis Andreo Pettyn

La Reveno kaj ni

La Reveno intensigis la rilatojn inter la ĉeflandaj kaj Honkongaj e-istoj. En la Tutlanda Konferenco de E-turisma Reto (18-20 apr., Zhongshan), la Honkongaj partoprenantoj guis specialan, zorge aranĝitan vesper-feston kiu celebris la revenon de Honkongo al la patrujo (vd. jul-aŭg., p. 138).

La kanto “Honkongo revenas al mi”, komponita de LU Jixin (aŭtorinta la poemaron *Invit’ al ĉinesko*), aŭdiĝis dufoje ĉe Ĉina Radio Internacia.

En nia junia E-semajnfino, antaŭ la Reveno, ni ricevis gratuleteron de Ĉina E-Ligo pri la Reveno. En la respondo, Honkonga E-Asocio antaŭvidas pli da fruktodona kunlaboro.

Bill Mak (Kanado/Honkongo)

Internacia Kongresa Universitato

En Montpeliero okazos la 51-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ simile kvalifikitaj personoj. Ili prezentu siajn prelegproponojn al la sekretario de la IKU-komisiono: prof. d-ro H.M. Maitzen, Endemangasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio. La propono enhavu koncizajn prelegresumon (maks. 200 vortoj) kaj biografion kun persona bibliografio. La prelego prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo, “Mediterraneo — ponto inter kulturoj”. La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honoraron, sed ne repagon de siaj kostoj. Ĉiuj prelegantoj devas esti kongresanoj kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj kaj unuafojaj IKU-prelegantoj. Limdato por kandidatiĝo: 15 januaro 1998.

Katedro en Amsterdamo

Ekde la 1-a de septembro interlingvistiko kaj E-o estas plenrajta parto de la universitata edukado en Nederlando. Dank' al kelkara preparado de laborgrupo konsistanta el e-istoj kaj simpatiantoj, apogata de rekomenda komitato eminentula, la necesaj financaj rimedoj troviĝis, kaj la Universitato de Amsterdamo kreis profesoran postenon pri tiu fako. Post anonco en nia revuo (feb., p. 32), el multaj kandidatoj diverslandaj elektiĝis 29-jara nederlandano, d-ro Marc van Oostendorp. Lingvisto doktoriĝinta kun laŭdo en Tilburg, li laboras ĉe la Nederlanda Insitituto de Genera Lingvistiko, ĉe la Universitato de Lejdeno. D-ro van Oostendorp estas membro de UEA.

CDELI tridekjara

En junio 1967 la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds (Svislando) inaŭguris ĉambron por la libraro kaj dokumentaro de Edmond Privat. Jen la origino de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia), kiu funkcias kiel sekcio de la Urba Biblioteko. La samurba Kultura Centro Esperantista (KCE) solenis la jubileon per interlingvistika monاتفino (27-28 sep.), en kiu prelegis i.a. Werner Bormann, Claude Gacond kaj Giorgio Silfer.


Neŭtrala arkivo de ĉiuj planlingvoj, CDELI ne estas la plej vasta E-biblioteko tutmonde, sed ja la plej kompleta rilate al la ceteraj planlingvoj.

KCE mem 30-jariĝos venontjare, je Zamenhof-tago. (*Ĉe la domparo*)

Spekulu je edukborso

Flandra Esperanto-Ligo bezonas aktualajn fotojn aŭ diapozitivon pri E-infanaranĝoj, kun minimuma klarigo, kiel inform-materialon por "eduka borso" (marto 1998, Gent). La koncerna sekcio de FEL (La Progreso, Peter Benoîtlaan 117, BE-9050 Gentbrugge, Belgio) ŝatus ricevi ankaŭ sinanoncojn de e-istaj instruistoj kiuj deziras komenci korespondadon kun lerneja klaso en Flandrio.

Forumo



Absoluta nigriĝo maljustas

Laŭ Aleksander Korĵenkov (jun., p. 117), je mia granda miro, malantaŭ la UEA-kotizoj siatempe venintaj el la ses "popoldemokratiaj" landoj Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando, ne estis realaj membroj; la landaj asocioj ricevis konsiderindan ŝtatan subtenon kaj pagis ĝin per "internaciisma" kaj "propaganda" laboroj kaj tiel povis "aĉeti" siajn komitatajn lokojn. Sekve UEA misproporcie havis la duonon de siaj aligitaj membroj en tiuj landoj.

Mi forte dubas ĉu Korĵenkov eĉ iom konas la siatempnan situacion en tiuj landoj. Mi vere bedaŭras ke li partoprenas la nuntempnan modon nigriĝi absolute ĉion en la pasinteco de tiuj landoj, eĉ la movadajn atingojn, ja absolute evidentajn al iom objektivemaj homoj.

Mi laboris de 1968 ĝis 1990 kiel salajrata sekretario de la orient-germana landa asocio GDREA, reelektiĝis en komplete sekreta baloto en 1990 (1990/91: vicprezidanto), kaj pro kialoj profesiaj kaj privata intereso (kio ĉe mi identis) mi tre detale sekvis la evoluon de la movado en tiuj landoj (malpli en Jugoslavio), cetere tre malsamaj laŭ gravaj trajtoj.

Certe, mi ne neos faritajn erarojn kaj tro naivajn kredojn. Certe, en tiuj landoj ne ĉiuj registritaj membroj estis brilaj esperantistoj, kaj bedaŭrinde ne ĉiuj "aĉetitaj" komitatanoj estis aparte aktivaj. En Sovetunio, malgraŭ la obstinaj "solidaraj" klopodegoj de la "frataj" asocioj, la movado apenaŭ havis eblon iom funkcii. (Eble pro tio la galo de A.K.)

Jes, ankaŭ veras ke ne estis evitebla certa propagandisma peresperanta laboro por la ŝtatoj. (Ĉu Korĵenkov postulas ke oni estu stariginta kontraŭŝtatajn Esperanto-organizaĵojn aŭ propagandinta reĝimŝanĝojn?)

Sed fakto restas ke tiu propagandisma laboro estis neglektinda

kompare al la grandega, serioze farita poresperanta agado, kvalite kaj kvante. Ĉu vere estas digne prezenti tiel supraĵe, memfide kaj mise la honestan laboregon de multaj esperantistoj en tiuj landoj? Ĉu estas honeste ignori tute obstinajn faktojn?

Jen kelkaj: hodiaŭ apenaŭ imageble larĝa disvastiĝo de la lingvo en la socio de la menciitaj landoj, elstaraj kongresoj, multaj brilaj diverstipaj aranĝoj, bonegaj revuoj, multflanka kaj altkvalita eldonagado, scienc-teknikaj agadoj, instruado diversnivela, konsiderindaj kulturaj atingoj, radio-elsendoj, interlingvistiko/esperantologio en universitatoj ktp. Hodiaŭ aperis ebloj en landoj kie ili antaŭe mankis, kaj inverse. Oni uzu la novajn ŝancojn sed ne taksu senvaloraj la iamajn.


GDREA, cetere, siatempe evoluis de 1200 al 2000 membroj, sed pagis dum jardekoj konstante nur por 500, pro la diabla valutomanko, do ĝi povis "aĉeti" nur unu lokon. (Feliĉe UEA neniam tro admonis pri la misproporcio.)

La prezentomaniero de mia kolego Korĵenkov, kiun mi pro lia eldonagado alte estimas, bedaŭrinde ne estas escepto. Tiajn falsadojn ne nur subtenas la spirita etoso ĉe kelkaj nunaj movadaj gvidantoj en la menciitaj landoj, sed ankaŭ la diverskaŭza neaktiveco de iamaj aktivuloj, krome timoj akcepti kaj defendi siajn biografion kaj agadon, kaj eble ankaŭ iu "fororgesemo" stimulata de la nuna spirita klimato. Pro tio necesas skribi objekte kaj detale la historion de la movado en la koncerna soci-historia etapo de la menciitaj landoj. Iamaj membroj de GDREA komencis fari tion.

Detlev Blanke (Germanio)

Praga Manifesto

Ĝis redaktofino la nombro de subskriboj atingis **9265**.



Apoteoza verko reuniga

El miaj sonoraj soloj. Poemoj 1992-1995. Miguel Fernández. Vieno: IEM, 1996. 100p. 23cm. 22,50 gld.

Mi ne povas forgesi kiam, en 1993, en nia beletra areno eksplodis la t.n. "Ibera Skolo" (Camacho, Neves, Fernández, Dek, Montagut, Valén), kiu tiujare akaparis preskaŭ ĉiujn premiojn en la Belartaj Konkursoj. Ĵuriano en ties poezia branĉo, mi memoras miajn miron kaj entuziasmon ĉe la malkovro de tiuj novaj, ekscitaj kaj tradicirompaj poeziaj voĉoj. Aparte min emociis iu poemo, "Ĝama am" aŭ sonĝo ĉiunokta". Nur poste mi eksciis ke ĝin aŭtoris iu Miguel Fernández, kiu jam vaste aktivis beletriste, i.a. per tradukoj de prestiĝaj verkoj, kiel dramoj de García Lorca. Tial, tiun jaron en la Valencia UK, mi volis ekkoni la admiratan poeton. Kaj en Valencio la emocio renoviĝis, klimaksis, pro la premiero de *La profil' de viaj spuroj*, lirika/muzika spektaklo, kie Fernández deklamis sian poemaron (kun la ĉarma Ana Manero) kun akompano de orkestro, impona koruso kaj



Miguel Fernández

du gesolistoj. Ĉe la fino de la spektaklo la tuta salonego spontane ekstaris por

ovacie aplaŭdegi. Kaj la sukceso renoviĝis kiam Fernández, majstre kaj pasie, prelegis pri García Lorca, pliriĉigante sian prezenton per vibra kantado. [Pri lia monografio *Sur la spuroj de Federico García Lorca* vd. p. 176. –Red.]

Sed post tiu eventa jaro mi iom post iom seniluziiĝis pri la kroma evoluo de nia poezio, ĝis... finfine, antaŭ nelonge, mi ricevis la kolekton de Fernández. Ha, mi jubilis: mi reunigis, repaciĝis kun mi mem: eble mi ankoraŭ kapablas distingi, juĝi, emociiĝi!

Fakte, laŭ mia modesta pritakso, per ĉi tiu apoteoza verko Fernández ne nur konfirmas sian elpruvitan artismon, sed eĉ elanas avancen, diboĉe transcendas la iom miĥalskieskan kaj nervieman inspiron de la antaŭa produktado; li nun voluptas hiperbole plurĝenre, diverse, korifeante ne nur pri amo (kie li nepre majstras, al li mi povas apudigi nur Marjorie Boulton), sed ankaŭ pri sociaj temoj (kie lia ne ĉiam facila poezio iĝas pli interparoleca, komprenebla) kaj pri sincere kortuŝaj omaĝoj (al Régulo Pérez, García Lorca, Nervi, de Diego, Neves k.a.).

Kaptus min la tento pluki el liaj poemoj, ĉar ne malofte unuopaj versoj aŭ tropoj estas ĉe li fajnaj poemoj en si mem, sed mi jam sufiĉe panegiris, esperante tikli la deziron de la poeziŝatantoj aĉeti la libron, por mem malkovri kaj ĝui la entenatan trezoron.

Aldo de' Giorgi (Italio)

Valora, viva ĉiutageco

Verkoj de Ronald Cecil Gates: **Kolera afero**. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1993. 88p. 21cm. 12,00 gld. **Sep krimnoveloj**. Matraville: AEA, 1993. 84p. 21cm. 12,30 gld. **Morto de sciencisto**. Antwerpen: FEL, 1994. 83p. 21cm. 12,30 gld. **Refoje krimnoveloj sep**. Matraville: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1994. 90p. 21cm. 12,90 gld. **Tria kolekto da krimnoveloj**. Matraville: AEA, 1996. 84p. 21 cm. 13,50 gld.

Temas pri entute du krim-romanetoj kaj 21 krim-noveloj. En la romanetoj, same kiel en la pli frua *La septaga murdenigmo* (1991), polica komisaro Roberto Elis kaj universitata gardisto Petro Tomson kune solvas la murdokazojn de juna ano de ŝtelisto bando kaj de mikrobiologo. La aŭtoro uzas tre simplan, bonan kaj fluan stilon dialogecan, kaj li enfokusigas pli la okazaĵojn ol la rolulojn kaj ties psikologion, kiujn li iom supraĵe skizas. Sed Gates celas ne tiom beletron kiom distron, kaj li ja sukcesas teni la scivolon de la leganto pri la identeco

kaj motivoj de la kulpulo. Ekzemple, en *Morto de sciencisto* sursceniĝas almenaŭ ses suspektatoj kaj diversaj eblaj krim-motivoj. La romaneto okazas en fikcia aŭstralia kampara urbo kaj la proksima universitato. Gates, eks-estro de ĝuste tia institucio, lerte kaj elvoke priskribas la intrigejojn kaj la etoson.

La novelojn la aŭtoro senpretende nomas "tranĉaĵoj el la teksaĵo de la homa vivo, prezentitaj laŭpove en simpla, ĉiutaga Esperanto". Nu, ĝuste la ĉiutageco kaj dialoga viveco estas la plej valoraj aspektoj en ĉiuj verkoj de

Gates. Kvankam informo pri anstataŭa piŝto de ventpumpilo, tute senliga al la intrigo (*Kolera afero*, p. 55), povas ŝajni sencela detalemo, tamen ni konsideru ke — ĉar la plej multaj eistoj ne parolas la lingvon ĉiutage kaj ĉiasituacie — tia detalemo ludas en nia literaturo ian paroligan rolon, apenaŭ necesan en nacilingvaj verkoj.

La formojn *sidonemo*, *sidemandado* k.a. en *Tria kolekto*. . . mi unue pensis tipografiaj misoj, sed Gates ja uzas ilin intence, spite ke pli frue li skribis *singardeco*, *sindorlota* k.a. Mi rimarkis kelkajn anglismojn, kiel *kaplampo* anstataŭ *lumĵetilo/reflektoro*. La uzo de formoj kiel *manĝantis* kaj *ricevantis* feliĉe malpliĝas en la pli freŝdataj verkoj. Ĉi tiuj estas ja pli bonaj ankaŭ el struktura kaj enhava vidpunktoj.

Por distriĝi kaj samtempe plivastigi nian ĉiutagan vortprovizon la verkoj de Gates estas tre legindaj.

Bruce Crisp (Kanado)

Laste aperis



ABC de la Eŭropa Unio; Enkonduko en la eŭropan juron. María Rafaela Uruña Álvarez (1942). Santiago: Universidade de Santiago de Compostela, 1997. 109p. ISBN 84 8121 642 9. 24cm. Kun fotoj. Studkajero por la Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per Esperanto. Pri la evoluo, la organoj kaj la juraj fundamentoj de Eŭropa Unio. 24,00 gld.

Alienisto, La (1882). [Joaquín María] Machado de Assis (1839-1908). El la portugala trad. Paulo Sergio Viana. Chapecó: Fonto, 1997. 95p. 21cm. Romaneto pri la instalo kaj evoluo de frenezulejo en brazila urbeto. 21,00 gld.

Analisi comparativa del lessico italiano, esperanto ed unghereze a fini didattici. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 8. Katalin Smidélíusz (1957). Milano: Coedes, 1997. 49p. ISBN 88 85872 09 3. 30cm. Itallingva. Instrucela leksika komparo de la itala, Esperanto kaj la hungara. 13,50 gld.

Analoj de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo. 1937-1997. 60 jarojn sub stelo-flagrado. Gilbert R. Ledon (1931). San-Paŭlo: la aŭtoro, 1997. 70p. 23cm. Historio de grava brazila movadero. 7,50 gld.

Anarkia konstruo. Al homkonforma sociordo (Psikologiaj faktoroj de efektivebleco). Gilbert R. Ledon (1931). La aŭtoro, 1997. 35p. 23cm. Teknikaj kajeroj 3. Propono de anarkio kiel "vivipova ordo" por "la pretervivo de la homaro". 6,00 gld.

Antaŭparolo de "Kromvelo". Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm. Novelo. Kiel romantikisma manifesto de Viktoro Hugo ligiĝas al la milittempa realo de usona marsoldato. 5,40 gld.

Dia kolero. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 23p. 22cm. Novelo pri peko kaj puno okazintaj en preĝejo. 4,80 gld.

Dialogoj pri religio. B. A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1997. 24p. 21cm. Divers-originaĵoj pri Dio kaj religio, en la formo de filozofiaj konversacioj. 4,50 gld.


"Doktoro Jivago" — Poemoj. Boris Pasternak (1890-1960). El la rusa trad. Kris Long. Chapecó: Fonto, 1992. 80p. 21cm. Poemoj kiuj "ŝajnis nur postpensoj en naci-lingvaj eldonoj" de la fama romano de Nobel-premiito, sed "pli ĝuste la romano komentarioj la poemojn" (la tradukinto). 18,00 gld.

Dudek poemoj amaj kaj unu despera kanto (1924). Pablo Neruda (1904-73). El la hispana trad. Fernando de Diego. Chapecó: Fonto, 1997. 80p. 21cm. Dulingva. Ilustris Carybé. La unua poemo de la Nobel-premiita ĉilia aŭtoro, kiu ĝis hodiaŭ restis lia plej populara verko. 21,00 gld.

Elevatora Seulo / Elevatornyj Seul. KIM Yocho (1962). El la korea kaj el Esperanto trad. BAK Ĝiŭan resp. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 1996. 111p. ISBN 5 7161 0028 7. 20cm. Trilingva: E-korea-rusa. 26 poemoj de juna poetino, "veraj floroj de la korea lingvo" (BAK Ĝiŭan). 7,80 gld.

Esperanto Language in Elementary Schools, The. Red. Kent Jones (1926). Chicago: la kompilinto, 1997. 46p. 28cm. Ringe bind. Anglalingva. Materialoj pri la propedeŭtika valoro de Esperanto por bazlernejoj. 12,00 gld.

Faktoj pri Gulag. Hungaroj en punlaborejoj de Gulag; Pri Solĵenicin (1974). János Rózsás (1926). El la hungara trad. Tibor Szabadi. Debrecen: Debrecena Bulletin, 1997. 52p. 20cm. La aŭtoro pasigis naŭ jarojn en sovetiaj punlaborejoj, kie li i.a. amikiĝis kun Solĵenicin. 18,00 gld.



Jen nur 3 el la 14 titoloj per kiuj la brazila Fonto inundas la merkaton ĉi-monate.

Fjalor Esperanto-shqip / shqip-Esperanto. Dhe metodë e mësimit të gjuhës Esperanto. Zef Luigj Mjeda (1921). Tiranë, 1993. 235p. 20cm. Vortaro E-albana (ĉ. 4000 kapvortoj) kaj albana-E (ĉ. 8000) plus 12 lingvolecionoj. 18,00 gld.

F-vorta nepo, La. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 23p. 22cm. Novelo pri familia tragedio kaj fi-vortoj. 4,80 gld.

Ĝerŝvino en preĝejo. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm. Novelo pri du muzik-prezentoj specialaj. 5,40 gld.

Hanaoka Seiŝu. TONISSI Jooko. Ilustris ŜIBATA Hiroko. El la japana trad. EGAŬA Harukuni. Wakayama: Grupo Interpopola, 1997. 32p. 26cm. Kvarlingva: Esperanta, japana, ĉina, angla. Rakonto pri la kuracisto kiu la unua operaciis kun ĝenerala anestezo. 15,00 gld.

Hernani (1830). Victor Hugo (1802-85). El la franca trad. Georges Lagrange. Paris: UFE, 1997. 60p. 21cm. La plej fama, epokfara dramo de la aŭtoro, ŝablon-rompa inaŭgurilo de la romantikismo en teatro. 13,50 gld.

Horo kaj la vico de Aŭgusto Matraga, La (1946). João Guimarães Rosa (1908-67). El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1997. 63p. 21cm. Ilus. Rakonto pri simpla brutbredisto en la land-interno de Brazilo. 21,00 gld.

Indian-ostara hejmenrevenigo en Arizono. Dulingva kultura eseo. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1995. 19p. 22cm. Pri la redono de muzeo garditaj homaj restaĵoj al la indiĝenaj posteuloj. 3,90 gld.

Inocenta (1872). Alfredo d'Escagnolle Taunay (1843-99). El la portugala trad. Geraldo Pádua. Chapecó: Fonto, 1997. 237p. 21cm. Amromano kiu protestas kontraŭ la tiraneco de viroj super virinoj en la land-interno de la pasintjarcenta Brazilo. 42,00 gld.

Italanto — la itala variaĵo de Esperanto. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 7. Red. Renato Corsetti. Milano: Coedes, 1997. 34p. 30cm. Kvar prelegoj el seminario en 1995. 10,50 gld.

Joĉjo Mulato / La maskoj (1917). Menotti del Picchia (1892-1988). El la portugala trad. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1997. 108p. 21cm. Ilustris Mozinha kaj Tarsila. Du epikaj poemoj pri amo: tiu de malriĉa kampulo al filino de grandbienulo, resp. de Kolombina al Pieroto kaj Arlekeno, figuroj de la klasika itala komedio. 21,00 gld.

Kaj tiam floris la ĉerizarboj. I. Kune kun miaj kunvojaĝantoj; II. Viv-observoj. Aira Kankunen (1928). Göteborg: la aŭtoro, 1997. 127p. ISBN 9 972463 8 7. 21cm. Proza debuto de la konata poetino: noveletoj pri "la sortoŝanĝoj de niaj proksimuloj" (A. Pettyn) kaj mallongaj tekstoj pripensigaj. 19,80 gld.

Kantu Kanade! El la angla trad. kaj red. Marta Evans. Vankuvero: 69a UK, 1984. 40p. 28cm. 36 kantoj kun muziknotoj, klarigoj kaj ilustraĵoj. 12,00 gld.

Malvizito al Tulum. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm. Novelo pri vojaĝo al Meksiko. 5,40 gld.

Manoj de Eŭridika, La (1949). Pedro Bloch (1914). El la portugala trad. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1997. 63p. 21cm. Dramo monologa, prezentita jam pli ol 30 mil fojojn. 13,80 gld.

Manto, La. (Mantis religiosa). Romano. Paula Mährti (ps.). Chapecó: Fonto, 1997. 182p. 21cm. Malpruda aŭtobiografieca romano "ŝlosila" pri la evoluo, krizo kaj disrompiĝo de gepara rilato, en esperantista medio. 30,00 gld.

Markizino de O... (1807). Heinrich von Kleist (1777-1811). El la germana trad. Reinhard Haupenthal. Chapecó: Fonto, 1997. 61p. 21cm. Fama novelo, en kiu la aŭtoro evoluigas el anekdoto de Montanjo amhistorion kun sortoturnoj kaj profundaj psikaj implikoj. 21,00 gld.

Necesejaj rakontoj. Du dulingvaj noveloj. Edwin Grobe (1927). Angla-Esperanto. Tempe: Arizona Stelo, 1994. 15p. 22cm. 4,50 gld.

Neĝa blovado, La (1830). Aleksandr Puŝkin (1799-1837). El la rusa trad. Antoni Grabowski. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 16p. 20cm. Notoj de Aleksander Korĵenkov. La unua literatura elprovo (1888) de la ĵus naskita lingvoprojekto Esperanto. 3,30 gld.

Perdita orminejo en superŝticia montaro. Paĝoj el la historio de usona ŝtato Arizono. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1993. 12p. 22cm. 2,70 gld.

Pro Esperanto. Red. Antonio Alonso Núñez. Madrid: Federación Española de Esperanto, 1997. 80p. ISBN 84 605 6342 1. 21cm. Hispanlingva. Informkajero por ĝenerala publiko pri la monda lingvoproblemo kaj pri la realo de Esperanto. 3,90 gld.

Reveno de la reĝo, La (1955). John Ronald Reuel Tolkien (1892-1973). El la angla trad. William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. 399p. 21cm. Bind. La tria parto de la epopeca rakontego "La Mastro de l' Ringoj". 42,00 gld.

Robaioj, La. Umar Kajjam (1050?-1122). El la persa trad. Gaston Waringhien. Chapecó: Fonto, 1997 (3-a eld.). 151p. 21cm. Ilustris Eugene Karlin. Mondfama verko: rafinitaj kvarversoj, "en kiuj la pensolerto de scienculo kaj de artisto scias ekvidi kaj interplekti la analogiojn disajn tra la universo" (la tradukinto). 42,00 gld.

Saĝo de jarcentoj. La unua kajero: O. Ĥajjam, Ŝ. Rustaveli, A. Puŝkin kaj La dua kajero: W. Shakespeare, L. Tolstoj. Kompilis B.A. Zozulja. Rostov-Don: Verda Kukolo, 1996 resp. 1997. 23 resp. 20p. 21cm. Kolekto de pensigaj citaĵoj. Po 4,20 gld.

Servorajto, La / La sinmortigo. Geraldo Mattos (1931). Chapecó: Fonto, 1997. 55p. 21cm. Du komedioj ludeblaj de kvin geroluloj. 13,80 gld.

6a Konferenco de la esperantistoj de Alp-Adrio. 6a Conferenza degli esperantisti di Alpe Adria; Trieste 22-25 aprile 1994. Dulingva: E-itala. Trieste: Triesta E-Asocio, 1995. 122+12p. 24cm. Kun ĉiuj prelegoj (C. Minnaja, H.M. Maitzen, I. Koutny k.a.) kaj paroladoj. 21,00 gld.

Soci-politikaj konceptoj de L.L. Zamenhof. B. A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1997. 35p. 21cm. Eseo pri la idea evoluo de Zamenhof. 6,60 gld.

Supeo de la kardinaloj, La (1902). Júlio Dantas (1876-1962). El la portugala trad. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1997. 40p. 21cm. Versa unuaktaĵo: Tri altaĝaj ekleziuloj interŝanĝas en Vatikano rememorojn pri am-aventuroj. 13,80 gld.

Suplemento al Rusa-Esperanto vortaro de E.A. Bokarev. Dopolnenie k rusko-esperantskomu slovarju E.A. Bokareva. B. A. Zozulja (1941). Rostov-Don: Verda Kukolo, 1996. 103p. 21cm. Pli ol 3700 vortoj korektitaj, kompletigitaj, aldonaj. 9,90 gld.

Sur la spuroj de Federico García Lorca. Miguel Fernández (1950). Santiago: Universidad de Santiago de Compostela, 1996. 117p. ISBN 84 8121 499 X. 24cm. Kun fotoj. Monografio de poeto pri poeto, kun riĉa apendico enhavanta i.a. eseojn de ili ambaŭ. 24,00 gld.

Vivoj sekaj (1938). Graciliano Ramos (1892-1953). El la portugala trad. Leopoldo H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1997. 135p. 21cm. Ilustris A. Martins. Novrealisma romano pri la batalo de analfabeta bovisto kaj lia familio kontraŭ sekeco kaj malsato en Nord-Orienta Brazilo. La aŭtoro, elstara ano de la brazila modernismo, estis e-isto. 42,00 gld.

World language for one world, A. John Roberts. Antaŭparolo de John Wells. London: Association of World Federalists, 1997. 27p. 21cm. Anglalingva. Prezento de la monda lingvo-problemo kaj de Esperanto kiel ĝia solvo. 6,00 gld.

Zodiakidoj kaj aliaj rakontoj, La (1888-1904). Rudyard Kipling (1865-1936). El la angla trad. Katelina Halo. Chapecó: Fonto, 1997. 87p. 21cm. Kvin diverstonaj noveloj de la aŭtoro de *Tiel do kaj La krabo kiu ludis kun la maro*, atestantaj lian grandan kompaton al suferantoj. 21,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Vidbendo: La Alpoj Svisaj. Dokumenta filmo. Realigita de Francisko Randin (1951). Kameraisto Samuel Monachon. Muziko de Roger Baudet. Lingva konsilado: Claude Piron. Laŭzano: Filmoj Nandir, 1997. 30 min. Riĉa bildigo de la vivo de la naturo. 66,00 gld.

Vidbendo: Esperanto en la Brazila Altebenajo. Planis, filmis kaj reĝisoris Ciro Gomes de Freitas (1950). Barra do Graças - MT: Kuarup, 1996. 34 min. Dokumenta pri la E-aktivado en meza Brazilo, kun bildoj pri Bona Espero, la savano kaj la moderna arkitekturo de la ĉefurbo. 49,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



• Tri revuaj jubileoj

Unu el la plej altnivelaj lokaj gazetoj de Esperantujo, *La Eta Gazeto* el Triesto (Italio), atingis en julio sian 100-an numeron. La simile informkaj opini-riĉa *Debrecena Bulteno* (Hungario) fariĝis centnumera en majo. La redaktoro, Tibor Papp, estis ĉi-kiale intervjuita la 24-an de junio de la ĵurnalo *Hajdú-Bihari Napló* (pli ol 50 mil ekz.).

• Redaktoraj ŝanĝoj

Post ok jaroj, Antonio Marco Botta transdonas la dumonatan *Boletín de Hispana E-Federacio* al Miguel Gutiérrez Adúriz (Floranes 57-2-C, ES-39010 Santander; <liven@nexo.es>).

La germanlingva *Esperanto aktuell* de Germana E-Asocio iras de Jörg Birkefeld al Alfred Knapp (Tiefengrubener Str. 51, DE-99438 Bad Berka; ☐ <Ksommer344@aol.com>).

• E-novajagentejo unujara

La 25-an de aŭgusto laŭkutime ĉ. 90 homoj ricevis retmesaĝon de "Interredaktore" (<eventoj@hungary.net>). Tamen nekutiman pro sia temo: la unujariĝo de "Interredaktore" mem, servo ekfunkciinta la 14-an de aŭgusto 1996. De post tiam la redaktoroj de *Eventoj* preskaŭ ĉiutage dissendis al redaktoroj de aliaj E-periodaĵoj kaj al estraranoj de UEA kaj TEJO, por aperigo aŭ porinforme, movadajn novaĵojn kaj artikolojn: ĝis la 22-a de sept. 1997 entute 437 mesaĝojn. Nia revuo mem plurfoje ĉerpis el "Interredaktore", la plej ofta (preskaŭ ĉiutage) movada informilo, kiu funkcias kvazaŭ Esperanta novajagentejo. Dankon kaj gratulon!

La sepjara verkenigmo

En la lastaj sep jaroj, Ron Gates (74-jara) fariĝis per siaj detektivaĵoj unu el la plej fekundaj aŭtoroj Esperantlingvaj: ses titoloj eldonitaj (vd. p. 174) kaj pluaj en tirkesto. Ni renkontis lin en Adelajdo, kie li rektoris la Internacian Kongresan Universitatton.

Vi prelegis en IKU pri "La malbela jarcento", juĝante tre kondamne la ĉi-jarcentan arton. Pro kio vi, ekonomikisto, pritraktis estetikan temon?

Sciu ke de mia emeritiĝo en 1985 mi ne plu rigardas min kiel ekonomikiston. Nun mi bredas bovojn, okupiĝas pri Esperanto ktp. Tial, kiam mi ricevis la inviton prelegi en IKU, mi sentis min libera paroli pri io por mi pli interesa: kial plejparto de la nuntempa arto ŝajnas al mi neaprezinda? Fakte, la respondon mi trovis parte en ekonomiko.

Tiu respondo legeblas en la kajero de IKU-prelegoj. Sed eble pli grandan legantaron plu havos viaj detektiv-romanoj kaj -rakontoj. Kiam vi ekverkis ilin?

Baldaŭ post mia esperantistiĝo, kiu okazis en 1987 pro instigo de mia amiko Ralph Harry. Fakte, mi volis simple provi ĉu mi kapablas — post tiom ekonomikaj studoj — verki fikcion. Iun tagon mi simple ekverkis sen pripensi la intrigon: mi metis la figurojn en situacion, kaj atendis kiel ili kondutos. Mi celis nur distri min, sed Ralph Harry kaj Trevor Steele kuraĝigis min sendi la manuskripton al Flandra E-Ligo, kiu akceptis ĝin, *La septaga murdenigmo*, por publikigo.

Ĉu vi ne verkas angle? Ĉu nur nova lingvo povis doni al vi novan emon?

La anglalingva konkurenco estas tro forta. Tamen, mian unuan romanon mi ja angligis: manskribe, por mia familio. Sed mi trovis ke la verko en la angla vole-nevole fariĝas iom alia... kiu scias, eble eĉ alia persono devus fari la murdon!



Ron Gates

Ĉu vi havas multajn publikigotajn manuskriptojn?

Kiam FEL estis eldoninta tri el miaj titoloj, mi jam havis kvin aliajn pretajn. FEL diris ke la merkato ne povas tiom rapide gluti ĉion! Nu, ankaŭ Internacia E-Muzeo en Vieno eldonos ion de mi, la parte aŭtobiografian amromanon *La vidvino kaj la profesoro*. Dume mi verkas alian amromanon, *Semajno en la kamparo*. ★

Per-sone



• Ferez: Centjariĝo

Germaine Ferez festis en Nico (Francio) la 24-an de januaro la 100-an datrevenon de sia naskiĝo. Ŝi kun sia edzo Hubert Ferez (forpasinta en 1979) aktivis jam ĉe la flanko de tiaj movadaj pioniroj kiel generalo Sebert kaj Ernest Archdeacon. (*La informilo* de Orientfranca E-Federacio)

• Fettes-Olds: Filino!

Adriano havas fratineton: Kathleen (Katlina) Elise Olds naskiĝis al Beverly Olds kaj UEA-estranano Mark Fettes la 29-an de aŭgusto.



Ada Fighiera-Sikorska

• Fighiera-Sikorska: Omaĝoj

Multaj tra la mondo omaĝis al la memoro de Ada Sikorska-Fighiera, forpasinta antaŭ pli ol jaro, la 7-an de aŭgusto 1996. La Internacia E-Kongreso okazinta en Valencio (Hispanio) kaj la UK en Adelajdo donis ŝian nomon al kunvensalono; en la UK Jadwiga Gibczyńska ludis teatraĵon bazitan sur ŝia taglibro. Pola Radio rememoras pri ŝi dum plena dissendo la 1-an de novembro. (Interredaktore)

• Teodorowicz-Todorowski 90-jara

La nestoro de la e-istoj en Gliwice (Pollando) fariĝis 90-jara la 25-an de junio. Profesoro pri teknikaj sciencoj, poligloto, distingito de multaj honorigoj, prof. Tadeusz Teodorowicz-Todorowski agas por la enkonduko de E-o en la praktikon. Post 24-jara paŭzo, la E-lektorato en la Silezia Politekniko denove ekfunkciis antaŭ kelkaj jaroj ĉefe dank' al liaj klopodoj. Vi povas lin gratuli je: str. Karolinki 29, PL-44-121 Gliwice, Pollando. (A. Golonka, S. Mandrak)

E. A. EKKER / D. EISENBURGER:

Franz Schubert Muzika albumo

Bela, bindita, plenkolore
ilustrita 28-paĝa libro,
plus 60-minuta kompaktdisko.

Eldonejo KLEKS, 1997. Prezo: 54,00
gld. Nur libro (sen disko): 30,00 gld.
Triona rabato ĉe UEA ekde 3 ekz.





• Bharato: Gebelgoj vigligas

Post televid-elsendoj tutnaciaj pri E-o (vd. jul.-aŭg., p. 131) en Hinda Unio, multiĝis la informpetoj ĉe Federacio Esperanto de Bharato. En Pune 25 komencantoj kursis tri semajnojn sub la gvido de ges-roj Starck (Belgio), kies ĉeesto vigligis la lokan movadon kaj interesis la gazetaron. La 7-a Tutlanda E-Kongreso okazos la 13-an kaj 14-an de dec. en Tirupati (d-ro V. P. Ranganayakulu, P.O. Box 12, Tirupati North 517 501 Andra Pradesh, Hinda Unio; ☎+91/8574/29-242; <cybernet@cyberservices.com>). (Fenestro)

• Hungario: Zamenhof nefrakasebla

Pasintjare ni raportis (dec., p. 201) pri la ŝtelo kaj retrovo de Zamenhof-statuo Budapeŝta. Tamen, daŭris la suferoj de tiu ZEO. Ĉi-jare vandaloj disbatis la soklon kaj derompis ĝian

kapon. Videble, ili celis ne ŝtelon sed detruon. Post polica denunco kaj persista persvado de Péter Rados, la urbaj instancoj restarigis la statuon. (L. Szilvási)

• Katalunio: Rezolucio pri NRO-j

La 28-a Kataluna kaj 1-a Transpirenea Kongreso de E-o (1-4 majo, Figueres) en rezolucio konstatis “la kreskantan gravecon de Neregistaraj Organizaĵoj en (...) la internaciaj rilatoj”, esprimis sian apogon al la proponoj de la NRO-j reprezentataj en la kongreso — agantaj por paco, evoluo kaj justa komerco — kaj petis la grandan publikon, ĉefe e-istojn, pri simila subteno. La rezolucio ankaŭ kritikis “la ambiguan politikon de la membroŝtatoj de EU, kiuj laŭdire defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj siaj civitanoj, kio tamen ne konkretiĝas en realaj leĝoj por (...) la minoritataj lingvoj.” (Heroldo)

• Kroatio: Kongresaj eĥoj

Post 18 artikoloj kaj unu televida elsendo lige al la Unua Kongreso de Kroataj E-istoj (vd. jul.-aŭg., p. 125), la vaste legata gazeto *Večernji list* (400 mil ekz.) dediĉis la 24-an de junio apartan atenton al la kongresa poŝtmarko kun la portreto de Zamenhof, kiu aperis en 350 mil ekzempleroj.



Kun malfruo, en julio venis el la monforĝejo la speciala kongresa monero de 25 kunaĵoj. (S. Ŝtimec)

• Kubo-Italio: Ĝemeliĝo

Sekve de vojaĝo de Triestaj aktivuloj pasintan aŭtunon en Kubo, la prezidanto de la E-grupo de Santiago de Cuba, Pedro E. Peña Martínez, pasigis grandan parton de aŭgusto en Triesto por difini kun la estraro de Triesta E-Asocio la konkretan kunlaboron inter la du E-asocioj, kiuj ĝemeliĝis la 22-an de aŭgusto per oficiala ceremonio. Peña Martínez prezentis ĉi-okaze, en la sidejo de TEA, tipan teatraĵon de la kulturo afrika-kuba, kies foto ilustris du ampleksajn raportojn en la Triesta ĵurnalo *Il Piccolo*. La urbestro de Triesto, Riccardo Illy, verkis salutleteron al la urbestro de Santiago de Cuba, transportotan de Peña Martínez. (La Eta Gazeto, Interredaktore)

• Togolando: Asocio dekjara

Unuiĝo Togolanda por Esperanto (aliĝinta en 1995 al UEA) naskiĝis la 21-an de marto 1987 en la katedralo de Lomé. UTE povas fieri ke en Togolando de tiam okazis Unua Afrika Kongreso (1990), naciaj kongresoj (1990, 1994, 1995, 1996), internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI (1994), kaj regule aperas du periodaĵoj: la kvarmonata informilo *Alvoko* kaj la jar-kvarona *Ondo da Vero*. (Alvoko)

• Usono: Amerika solidaro

Tuj post la 28-a Somera Kursaro ĉe la Universitato de San-Francisko, samurbe kunvenis sesdeko da e-istoj por la 45-a kongreso de E-Ligo por Norda Ameriko (12-15 jul.). David K. Jordan prelegis pri la lingva situacio en Usono (konkludante ke neniuj lingvoj minacas la pozicion de la angla); Orlando Raola gvidis diskuton pri tio ĉu Esperantujo estas kontinento aŭ vilaĝo; Bill Maxey raportis pri sia printempa vojaĝo en Centra Ameriko kaj igis la kongresanojn solidare aĉeti hispanajn-Esperantajn vortarojn por la nikaragva movado. (Arko!)



Francio: Lingva printempo, lingva rekordo en Tuluzo

La e-ista kantisto Jean-Marie Leclercq (Jomo) kaj liaj muzikistoj koncertis en 22 lingvoj — laŭdire rekorda nombro —, i.a. en E-o, sur la Tuluza ĉefplaco Capitole, la 18-an de majo, kadre de la aranĝo “La printempo de la lingvoj”, kiun de 1993 kunorganizas la loka Esperanto-Kultur-Centro. Sur la ĉefpodio prelegis René Centassi, kunaŭtoro de Zamenhof-biografio (vd. jul.-aŭg., p. 134).

La 17-an de majo oni inaŭguris samurbe avenueon de d-ro L.L. Zamenhof, en ĉeesto i.a. de vic-urbeŝtrino Françoise de Veyrinas kaj de Jean-Paul Becvort (Instituto de Studoj Okcitanaj), kiu intencas lerni Esperanton por prezenti en la Montpeliera UK la lingvo-vivigan lukton de la okcitanistoj.



• Arto: Konkurso por infanoj

La Moskva E-klubo Lev Tolstoj kunorganizas internacian konkurson de infandeseĝnaĵoj pri "Pasinto, nuno, estonteco en la infana kreado", kiu okazas la duan fojon. En 1993-94 konkursis ĉ. 7000 infanoj el 25 landoj. La verkoj estu senditaj ĝis 31 dec. 1997. La plej bonaj ricevos premiojn, diplomojn kaj medalojn. Informas: E-Klubo Lev Tolstoj, P.f. 57, RU-105318 Moskva, Rusio; <era@glasnet.ru>.

• Edukado: Investi en plenkreskuloj

En la 5-a Internacia Konferenco pri Edukado de Plenkreskuloj (14-18 julio, Hamburgo) e-istoj ne reprezentigis oficiale, sed — laŭ peto de ILEI, ricevinta inviton de Unesko — Werner Bormann mallonge vizitis la konferencon. Laŭ lia impresio, "se ni e-istoj estus dezirintaj pozitive aperi en la fina dokumento, ni devus komenci la prilaboradon jam antaŭ jaroj... surloka elpaŝo ne estus sukceson promesinta". Aliflanke, iuj konkludoj de la konferenco (ke necesas pli da mona kaj tempa investo en plenkreskulan edukadon) povus favori E-instruadon, kiu ja plejparte direktiĝas al adoltoj.

• Ekumenismo: Evangelia servo

En la Dua Eŭropa Ekumena Kunveno (Graz, Aŭstrio, 23-29 jun.) partoprenis grupo de 42 divers-ekleziaj esperantistoj el 18 landoj, kiuj dum la tuta daŭro deĵoris ĉe stando por oferti peradon inter 18 lingvoj kaj informi pri "Esperanto kiel ekumena lingvo en la servo de la evangelio". Tri E-lingvaj prelegoj kun diskuto, interpretataj en la germanan, traktis la signifon de pastroj Max Josef Metzger kaj Dietrich Bonhoeffer por la ekumena movado kaj la kontribuon de Robert Schuman al la franca-germana repaciĝo. Ĉiuvespere pastroj el Germanio, Hungario kaj Italio kuncelebris Esperantan meson, helpe de *Ekumena liturgia libro* preparita por la okazo.

La spertojn de Graz oni povis tuj pritaksi dum konferenco en Zalaegerszeg (Hungario, 29 junio - 6 julio). (Kristana Alvoko)

• Instruado: Grupoj heterogenaj

Pedagogia projekto en Santiago de Cuba (Kubo), aprobita de Unesko, intencas demonstri ke blinduloj kaj surdmutuloj povas lerni E-on en grupoj heterogenaj, kun geknaboj sen handikapo. Interesatoj kaj helpemuloj skribu al Maria Luz Moya Luna, Zamorana 9,5 entre Aguilera y 1ª, Rpto Zamorana, CU-90300 Santiago de Cuba, Kubo. (*La Eta Gazeto*)

• Komputiko: Frankfurta renkonto

ELTEKO (Internacia laborgrupo pri Elektroniko, Telematiko kaj KOMputiko) organizas sian kvinan renkontiĝon (28-30 nov., Frankfurt sur Majno, Germanio). Ankaŭ komencantoj bonvenas. Aliĝu kaj proponu temojn al: Duhme, Friedensplatz 4, DE-35037 Marburg, Germanio; ☎ +49/6421/162-602; <duhme@stud-mailer.uni-marburg.de>; <http://members.aol.com/wdherndon/>.

• Tradukado: 66 adresoj

Internacia Tradukreto pere de Esperanto (ITRE), neprofitcela asocio registrita en Francio, eldonis adresaron de siaj 66 kunlaborantoj, kapablaj pri 28 lingvoj. La prezidanto de ITRE estas Daniel Durand (Les Nids, FR-49190 Saint Aubin de Luigné, Francio).

• Universitatoj: Salford oficiale

Post plurmonata persvado-kampanjo, ekde septembro la Universitato de Salford (Britio) proponas Esperanton



Paul Gubbins

kiel oficialan studobjekton elekteblan por unuajaraj studentoj de fremdaj lingvoj. La 90-hora kurso, prizorgata de d-ro Paul Gubbins (vd. p. 171), inkluzivos ankaŭ kulturajn, sociajn kaj historiajn aspektojn de la E-movado. Kredeble temas pri la sola brita universitato kie Esperanto ĝuas oficialan statuson. (En la Universitato de Liverpool Don Lord instruas ĝin ekster la oficiala studprogramo.)

• Vortaroj: Italaj kompaktigas, finnoj preparas

En sia lasta kunsido, la estraro de Itala E-Federacio decidis pri plano lanĉi kompaktan diskon kiu enhavos la vortarojn italan-E de Minnaja kaj E-italan de Broccatelli. (*L'Esperanto*) E-Asocio de Finnlando decidis eldoni novan finnan-Esperantan vortaron, kiu pretiĝos per plurjara laboro sub la gvido de prof. Jouko Lindstedt. (*Vekilo*)

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Japanio: Lisa Kobayasi.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONO (minimumo \$100): Germanio: Werner Heinrich.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Francio: Denise Loisel; René-Jean Marmou.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Francio: Auguste Huberdeau. Germanio: Rokuro Makabe; Werner Heinrich. Usono: Humphrey Tonkin; Jane Edwards.

DONACOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de aŭgusto

Fondaĵo Afriko: Svedio: J. Hammarberg 7,71. Sumo ĉi-jara 13 134,60.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: S.S. Ledon 100,00. Venezuelo: J.E. Bachrich 204,00. Sumo ĉi-jara 2235,13.

Fondaĵo Azio: Japanio: ĉe Japana Kongreso 1473,47; K. Esaka 35,20; T. Imazu 105,60; T. Itabasi 35,20; K. Katou 35,42; K. Kobayasi 35,20; S. Koga 70,40; T. Koyama 35,20; E. Nakano 35,20; Y. Takase 35,20; K. Tutiya 35,20; K. Yano 35,20. Sumo ĉi-jara 5318,71. Fondaĵo Canuto: Germanio: H. Schindler 50,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara 2800,07.

Kampanjo 2000: Svedio: S. A. Broman 64,62. Venezuelo: J.E. Bachrich 100,00. Sumo ĉi-jara 31 716,91.

Junulara Fondaĵo: Germanio: W. Heinrich 224,65. Sumo ĉi-jara 3745,60.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Brazilo: J.R. Piton 51,98. Germanio: M. J. Scherm 25,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara 699,98.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: N. Moerbeek-Bartels 25,00. R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara 880,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Karl BECKMANN (1906-1997), multjara prezidinto kaj honora prezidanto de Aŭstria E-ista Federacio, mortis la 2-an de majo. E-isto ekde 1921, li gvidis post Leopold Grimme (vd. majo, p. 100) en la Pedagogia Instituto de Vieno E-kursojn por instruistoj kaj estris la E-komisionon. Ekde 1973 li kontribuis al la E-elsendoj de Radio Aŭstria Internacia per traduko de entute 450 semajnaj komentarioj kaj per pli ol 400 propraj felietonoj pri Aŭstrio. Li verkis la broŝuron *Superrigardo pri Aŭstrio* kaj kunredaktis la dulingvan artikolaron *Esperanto survoje* (1984).

Marie-Josèphe BERGER (1933-1997), esperantistino el Clermont-Ferrand (Francio), mortis dum la Universala Kongreso en Adelajdo.

Paolo CERRETINI (1954-1997) pereis en trafik-akcidento la 10-an de junio, proksime al Crotone. Lerninta E-on en la aĝo de 12 jaroj, li estis dumviva membro de UEA, aktivulo de Internacia Komunista E-ista Kolektivo, gastiganto

de Pasporta Servo en Pizo (Italio), kaj delegito pri marksismo, turismo kaj dentmalsanoj. Profesie dentisto, li apartenis al tiuj malmultaj kiuj pro siaj kapablo kaj famo povus enspezi trioble pli, sed praktikas sian profesion laŭ la sama homarhelpa spirito kiu animis la okuliston Zamenhof.

Elwyn REED (1915-1997) mortis la 22-an de aŭgusto en la kalifornia Camarillo. Li instruis E-on sur militŝipoj kaj, post la milito, al skoltaj. Ekde 1940 li estis membro, de 1950 dumviva membro de UEA kaj ĝia delegito kvardekon da jaroj. En la usona landa asocio ELNA li membris preskaŭ dekomence (1952). Li estis aktiva korespondanto kaj publicisto por Esperanto.

Les SCOTT (1912-1997) forpasis la 9-an de majo en Manly (Aŭstralio). Unu el la plej fervoraj e-istoj en la regiono de Sidnejo, li estis dumviva membro de UEA, komitatano de 1989 ĝis 1992, delegito pri rotario kaj vicdelegito en Manly.



SOLIVA (Prof. SHAO Rong) (1925-1997) forpasis la 4-an de marto en Dalian (Ĉinio). Esperantisto de la 14-jara aĝo, kiel studento li kunfondis Esperanto-klubon. En 1948 en Honkongo li klopodis por restarigo de la tiea E-asocio. En Dalian li iniciatis, en la politekniko kie li instruis, la enkondukon de E-o kiel dua fremda lingvo. Post emeritiĝo, li dediĉis sin al esperantologio kaj terminologio, kampoj pri kiuj — krom matematiko — li estis delegito. Soliva verkis la lernilojn *Shi jie yu* (1986) kaj *Lernolibro de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj* (1989) por ĉinaj studentoj kaj, kun ZHANG Xiaoxia, la broŝuron *Materiale pri la oficiala Esperanto-instruado en Ĉinio* (1989, 1991, suppl. en 1993).

starigo de la tiea E-asocio. En Dalian li iniciatis, en la politekniko kie li instruis, la enkondukon de E-o kiel dua fremda lingvo. Post emeritiĝo, li dediĉis sin al esperantologio kaj terminologio, kampoj pri kiuj — krom matematiko — li estis delegito. Soliva verkis la lernilojn *Shi jie yu* (1986) kaj *Lernolibro de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj* (1989) por ĉinaj studentoj kaj, kun ZHANG Xiaoxia, la broŝuron *Materiale pri la oficiala Esperanto-instruado en Ĉinio* (1989, 1991, suppl. en 1993).

Roger Bernard (1907-1997)

Unu el la feliĉaj cirkonstancoj de mia esperantisteco estis ke frue mi iniciĝis movaden per Raymond Schwartz kaj ties rondo. Lin kaj ĝin poiome forfalĉis la morto, kaj unu post alia vanuis Dubois, Nels, Waringhien, Thierry — kaj nun Roger Bernard. Ĉi lastan, post esperantistiĝo antaŭ la Pariza UK (1932), jam premilite logis la kabareto de Schwartz, al kiu li multe kontribuis. Bernard estis — se apliki la vortojn de Kalocsay pri Baghy — siaspeca “sovaĝa talento”. Ne nur la kabareta medio konvenis al lia naturo (li ŝatis kanti kaj farsis), sed lia leĝera plumo lin dotis disponigi al ni aron da lingve atentindaj tradukoj: *La naŭzo* (1963) kaj *Sen eliro. La respektima p...* (1964), ambaŭ de Sartre, la teatraĵoj *La homa voĉo/La bela indiferentulo* de J. Cocteau (1984) kaj *La portugalaj leteroj* de Guilleragues (1986). Ĉe Régulo aperis du aliaj elfrancigoj: *Topaze* de M. Pagnol kaj *La ŝipego “Tenacity”* de C. Vildrac (1960, unuvolume), kaj oficiale en 1976, fakte nur en 1988 (kun helpo de UEA) *La granda Meaulnes* de A. Fournier.



Ankoraŭ en la 30-aj jaroj Bernard partoprenis en la traduko de *La mizeruloj* de V. Hugo, sed fine *Literatura Mondo* — al kiu li kontribuais ekde 1934 — ne povis ĝin publikigi.

Plurfoje mi mem havis la plezuron eldoni (ĉe Iltis) verkon de Roĝero: *Apenaŭ bukedeto* (1971, 1984), *Unu tago post la alia* (el la itala, 1982) de nia komuna amikino Clelia Conterno, kaj fine *Francaj kanzonoj*, kun Waringhien. (Bernard tradukis almenaŭ 150 francajn kanzonojn, ĉu aperintajn diversloke ĉu ankoraŭ malkovrotajn!) En 1991 nian kunlaboron kronis *La*

buton-milito de L. Pergaud. Multajn horojn ni kune ŝvitis super la plej tiklaj traduk-problemoj de ĉi verko.

Kiam Waringhien transprenis la rudron de la Akademio, li insistis ke Bernard iĝu ne nur ties membro (kio li restis de 1964 ĝis la morto) sed ankaŭ, kiel sekretario, lia dekstra mano. Waringhien trovis en Bernard sian plej fidelan kaj lojalan servanton. Ĉi duopo kunlaboris sam-konstelacie ekde 1965 ĝis la abdiko de Waringhien en 1979. Cetere, Bernard kontribuis ankaŭ al la 2-a eldono (1968) de *Parnasa gvidlibro* de Kalocsay-Waringhien, per rimvortaro.

Bernard estis iam aktiva Cseh-instruisto, ĵuriano en la proza branĉo de Belartaj Konkursoj (ĝis 1975), membro de UEA ekde 1935, kaj ĝia delegito de post emeritiĝo (1973).

Por la praktikanta katoliko Bernard, la katolika dogmaro havis same solidan validon kiel bona plado aŭ ŝaŭma ĉampano. En la tago mem de sia 90-jariĝo (10-a de aŭgusto), de ĉi mondo fizika li transiris en la spiritan, laŭ sia profunda kredo por revidi la surterajn amikojn — kaj la amatan edzinon, kiu lin antaŭis la 30-an de junio.

Reinhard Haupenthal (Germanio)

Stelo-moneroj denove haveblaj!

Universala Ligo transdonis al UEA la tutan restantan stokon de la stelo-moneroj, tiel ke la unika kolekto de tiuj numismatikaĵoj estas denove aĉetebla.



★ **Kompleto de stelo-moneroj.** Kvar moneroj de 1, 5, 10 kaj 25 steloj. Vidu apartajn priskribojn ĉi-sekve. **Prezo: 75 gld.**



★ **Monero de 1 stelo.** Bronza. Diametro 20mm., dikeco 1,5mm., pezo 3,4gr. Havebla nur en kompleto (vidu ĉi-supre).



★ **Monero de 5 steloj.** Latuna. Diametro 23,5mm., dikeco 1,7mm., pezo 5gr. **Prezo: 4,80 gld.**

★ **Monero de 10 steloj.** Kupronikela. Diametro 28mm., dikeco 2mm., pezo 9gr. **Prezo: 9,90 gld.**

★ **Monero de 25 steloj.** Arĝenta (90%). Diametro 38mm., dikeco 2,5mm., pezo 19gr. **Prezo: 60 gld.**



Triona rabato ekde 3 ekz. de la sama monero aŭ de 3 kompletoj. Aldoniĝas 10% por afranko kaj (por klientoj el Eŭropa Unio) 17,5% por imposto. Mendu ĉe UEA!



Blonda leporo kaj Urso brunulo
Jen bela novaĵo en la magra branĉo de nia poezio por infanoj. Kolekto de 57 poemoj de 22 poetoj, ĉio en flua kaj ofte surprize bela traduko.

Al la mondo donace

Antologio de la serba porinfana poezio
INFANLIBRO DE LA JARO 1997

Elektis kaj el la serbokroata tradukis Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996. 80+80p. 20cm. Dulingva. Kun notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 24,00 gld.

Triona rabato ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

Geedza paro, germana, kiu havas sepdek du kaj okdek du jarojn, serĉas sinjorinon, kiu vivos kun ni en tre bela ĉirkaŭaĵo apud la "Blua Maro" inter Toulon kaj Marsejlo. Ni vivas sole, sen infano. Ŝi, la sinjorino, preparos la manĝaĵon por ni kaj por si mem. Purigistino ni havas. Ni donos loĝejon, *ne monon*. Ŝi povos resti monatojn aŭ jarojn. Ni akceptas nur sinjorinon kiu devenas el *okcident-eŭropa lando*. Skribu al UEA, menciante la kodon "rsto-l".

Por esti ĝisdata pri la evoluo kaj faka literaturo de interlingvistiko kaj esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

SENĜENAJ DIALOGOJ

UEA aĉetis la stokon de ĉi tiu fascina verko de Alberto Fernández pri la fundamentaj natursciencaj demandoj (materio, atomo, tempo, gravito, evoluo, genetiko, biosfero). 197p. Multaj ilustraĵoj. La prezo malaltiĝis de 29,70 al 18,00 gld. *Triona rabato ekde 3 ekz.*



Alberto Fernández

SENĜENAJ DIALOGOJ

POPULARSCIENCA ESPLORO
FUNDAMENTAJ DEMANDOJ

STAFETO

NACIA ESPERANTO MUZEO

FR - 70100 GRAY
19 rue Victor Hugo
Tel. 03.84.65.11.73



En 10 salonoj de publika konstruaĵo ĝi estas samtempe: ARKIVEJO – Dokumentejo – Biblioteko kun 6000 titoloj (libroj kaj broŝuroj) – KONSTANTA EKSPozICIO (revuoj kaj diversaj esperantajoj).

UNUNURA EN FRANCIO

LAŬDIRE LA PLEJ EKLEKTIKA KAJ ALLOGA EN LA MONDO

NEPRE VIZITU ĜIN

Helpu al ĝia pliampleksigo per daŭra sendo de dokumentoj kaj ĉiuspecaj eldonaĵoj.

MALFERMO

Ĉiujn merkredojn kaj sabatojn de la 15a h. ĝis la 18a h. aŭ interkonsente kun la Direktoro
S-ro GEO JUNIER
Tel. 03 84 65 11 73

Cent jaroj (1896-1996) da
stratoj, placoj, monumentoj,
bustoj, kulturcentroj,
tabuloj, parkoj, pontoj,
asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER


Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam:
UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabe-
loj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo:
18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Transpontu la atendon

Jam temp' está
pensi
pri la UK...



... kaj glufermi viajn kovertojn per la nova kongresa glumarko.
51x34mm. Blua-flava-verda. Folio kun 32 markoj: 7,50 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis
60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-
jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas
vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur
parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1998...

Esperanta Antologio. La plej
impona kolekto de originalaj poemoj.
900p. Bindita. 60 gld. € 24 gld.

Ni kaj ĝi. Eseoj de Waringhien pri
religio kaj arto. 346p.
45 gld. € 18 gld.

Nova Esperanta krestomatio.
Moderna antologio de E-literaturo.
510p. Bindita. 57 gld. € 33 gld.

Infoduktoj. Pri la komputila revolucio.
142p. 19,50 gld. € 9 gld.

Faktoj kaj fantazioj. Marjorie
Boulton. Renoma progresiga legolibro.
431p. 36 gld. € 18 gld.

La arbo de la sciado. Filozofia ro-
mano de Pio Baroja. 222p.
24 gld. € 12 gld.

**Lingvistikaj aspektoj de Espe-
ranto.** John Wells. 76p.
15 gld. € 9 gld.

Kantoj kaj romancoj. La famaj
ampoemoj de H. Heine. 381p.
39 gld. € 18 gld.


La danĝera lingvo. Ulrich Lins.
Studo pri persekutoj kontraŭ Espe-
ranto. 546p. 66 gld. € 39 gld.

Studoj pri la Internacia Lingvo. En
Eo/angla/franca/germana. 155p.
24 gld. € 18 gld.

Tiu ĉi oferto validas
ĝis la 31a de dec. 1997.
Mendojn bv. adresi al la Libroservo
de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj
titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendo-
kosto je 10% (minimume 5 gld.)
kaj, por loĝantoj en EU,
imposto je 6%.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

BEL + Fonto = movada progreso!
Brazila Esperanto-Ligo estas la
ekskluziva distribuanto de la
famaj libroj eldonitaj de Fonto.

Mendu ilin ĉe:
Brazila Esperanto-Ligo
Cx. Postal 03625
70084-970 Braziljo (DF), Brazilo.

Urseto venĝemas.
Erinaco ĉagreniĝas.
Museto ludas pianon.
Kaj kateto faras...

AGNIESZKA USAKIEWICZ

Kiel ĉiuj katetoj

Ilustris Aleksander Oczo. El la
pola trad. Wojciech Usakiewicz.
Bielsko-Biala: KLEKS, 1993.
64p. 26cm. Plenkolora presita.
Bindita. Ok rakontoj por laŭtleĝi
kaj kungui familie. 24,00 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.

